

EL POPOLA ĈINIO

中國報

6

1978






Unu el la stratoj de Nanning

La urbo Nanning

Nanning estas la ĉefurbo de la Guangxi-a Ĝuang-nacieca Aŭtonoma Regiono kaj centro de ĝiaj politiko, ekonomio kaj kulturo.

La nomita urbo situas sude de la norda tropiko kaj apartenas al subtropika zono, ĝia jara meznombrata temperaturo estas ĉ. 21° C. Ĝi havas historion de pli ol 1,600 jaroj. Tamen antaŭ la Liberiĝo ĝia areo estis malpli ol 5 kvadrataj kilometroj kaj ĝia loĝantaro nombriĝis malpli ol centmil. Tiam en ĝi troviĝis nur malgrandaj presejo, alumeta fabriko, akvoprovizejo kaj elektrostacio. Post la Liberiĝo, sub la gvido de la Partio, Nanning kun kvincent mil ĝuang-aj, han-aj, mjaŭ-aj kaj jaŭ-aj loĝantoj faris kontribuon en la socialisma konstruado. Nun en ĝi konstruiĝis pli ol 400 fabrikoj de metalurgio, karbo, maŝinoj, elektroniko, ŝipkonstruado, tekstilajoj, kemiaĵoj, medikamentoj, manĝaĵoj kaj konstruaj materialoj, kun pli ol 3,000 specoj de produktajoj. Tiu antikva konsumata urbo jam transformiĝis en prosperan produktan urbon.

La fizionomio de la urbo renoviĝis en disvolviĝo de la industria produktado. Post la Liberiĝo nove konstruiĝis fabrikoj kaj loĝdomoj kun plankareo de pli ol 4,405,000 kvadrataj metroj, kiuj estas pli-ol-10-oblo de la totala plankareo de la konstruaĵoj de la malnova Nanning. Krome konstruiĝis kultura palaco, biblioteko, ekspozicia halo, sporta halo, magazenoj, lernejoj, infangardenoj, hospitaloj, teatroj kaj kinejoj. La mallarĝaj stratoj antaŭ la Liberiĝo estas jam reformitaj, larĝigitaj kaj borderitaj per arboj. En ĝia norda antaŭurbo, kie estis malmultaj arboj kaj multaj sovaĝaj herboj en la pasinteco, nun jam konstruiĝis la Popola Parko kun areo de 52 hektaroj.



Fervoja Stacio de Nanning



En la Fabriko
de Enladigitaj
Manĝaĵoj de
Nanning



Parto de Nanning




La Guanghi-a Sporta Halo



Teknikistoj de la
Guanghi-a Farmakolo-
gia Instituto kulturis
drogoherbojn.



En komunumo de la
antaŭurbo de Nanning



La Popola Parko

En la Tutlanda Sciencia Konferenco


Reprezentantoj de la Ministerio de Petrola Industrio en diskutado



Goŭ Pejjuan (la dua de dekstre), vicesstro de la Ĉina Akademio de Sciencoj, kune kun reprezentantoj de Pekino



Vu Giĉang (dekstre), kamparano-sciencisto de Ŝanhi-provinco en la konferenco



Avangardaj laboristoj de la administra buroo de la Ĉina Akademio de Sciencoj interŝanĝas sperton en la konferenco.



Geknaboj varme gratulas triumfan fermigon de la konferenco.



Por gratuli la malfermiĝon de la konferenco, du ruĝaj gvardianoj de Giangsu-provinco alsendis po unu ruĝan koltukon por donaci ilin al plej maljunaj reprezentantoj en la konferenco. Jen 90-jara Profesoro He Gie ĝoje akceptis la donacajon.



22-jara Vang Hiangjong (meze), la plej juna el la reprezentantoj de la konferenco, estas teknikistino en komunika sekcio de la Pekinaj Trupoj.

EL POPOLA ĈINIO

中國報通

1978
N-or 6
(237)

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Guozi Shudian P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

KOVRILO:

P. 1. Ni amas Tian-anmen-pordeton en Pekino.

P. 2. Floroj diverskoloraj



Enhavo

Marŝo al la modernigo de scienco kaj tekniko	2
Eksterlandaj esperantistoj en Ĉinio	6
Nova aspekto de la ĉina eduka fronto	7
La reformita varbado de studentoj	12
En la Unua Mezlernejo de Ŝigiaĝuang	17
Novaj plantidoj fortikaj	22
Neforgeseblaĵo	25
Ŝati sciencojn de infanaĝo	27
Modela vendisto Ĝang Binggug	30
Demokratio en produkta brigado	32
Pri insignoj	34
KURANTAJ AFEROJ	35
Kanto de la juneco (Daŭrigo)	36
EN PEKINO: Ĝoukoŭdian	
— "hejmo" de la Pekin-homoj	40
HISTORIAJ OBJEKTOJ: Unu dazibaŭo	43
AMIKECO: Letero al japana amiko	44
KALEJDOSKOPO: Rostita pekina anaso	46
Petofi, hungara patriota poeto	47
INTER NI: Iom pri la ĉinaj naciaj muzikiloj	49
Esp-novajoj	52
Korespondi deziras	52

Marŝo al la modernigo scienco



La Tutlanda Scienca Konferenco

EN la marta Pekino, printempa vento alportis varmon kaj ĉio reviviĝis. Kaj de la 18-a ĝis la 31-a de tiu monato okazis tie la Tutlanda Scienca Konferenco, senprecedence grandioza en la ĉina scienca historio.

Prezidanto Hua Guofeng persone prezidis la konferencon kaj stimulis ĝian ĉeestantaron per sia manskribo: “Havu grandan ambicion kaj

altan celon kaj marŝu al la modernigo de scienco kaj tekniko”.

La konferencon ĉeestis ankaŭ vicprezidantoj de CK de KPCĈ Je Jianjing, Deng Hiaŭping, Li Hiannian kaj Vang Donghing. Ĉirkaŭ 6,000 reprezentantoj el ĉiuj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de la tuta lando, el la centraj institucioj de la Partio kaj la ŝtato kaj el la

de kaj tekniko



Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj fakoj de nacidefendaj industrioj partoprenis en la konferenco. Inter ili estis eminentaj sciencistoj kaj teknikistoj, lertuloj en teknika renovigo, modeloj pri scienca terkulturado kaj kadroj de sciencaj fakoj.

En ŝtorma manklakado Prezidanto Hua faris gravan paroladon sub la titolo “Levu la Sciencajn kaj Kulturajn Nivelon de la Tuta Ĉina Nacio”.

Li diris: Levi la sciencajn kaj kulturajn nivelon de la tuta ĉina nacio estas kolosa tasko metita antaŭ nia tuta popolo. Ĝi estas tasko kun strategia graveco. Sen plenumo de tiu tasko, la ĝenerala tasko por la nova periodo ne povas esti plenumita. Prezidanto Hua montris, ke la modernigo, kiun ni volas, estas socialisma modernigo atingota per firma daŭrigo de la revolucio sub la diktaturo de la proletaro. Li montris ankaŭ, ke estas necese emfazi la sloganon elmetitan de Prezidanto Maŭ pri lerno de fremdaj landoj, por levi la sciencajn kaj kulturajn nivelon de la ĉina nacio.

En sia parolado, Vicprezidanto Deng Hiaŭping eksplikis la tezon, ke scienco estas parto de produktaj fortoj, kaj la problemojn pri konstruo de scienca kaj teknika armeo kaj ruĝa kaj sperta, kaj pri la partia gvido super la sciencajn kaj teknikajn fakoj. Li diris, ke ĝusta kono pri tio ke scienco kaj tekniko estas parto de produktaj fortoj, kaj ĝusta kono pri tio ke la mensaj laborantoj servantaj al socialismo estas parto de la laboranta popolo, havas ekstreme striktan rilaton kun rapida disvolvado de nia scienca afero. Li montris, ke, por marŝi al la modernigo de scienco kaj tekniko, ni devas havi grandegan laboristan sciencajn kaj teknikajn armeon kaj ruĝan kaj spertan, devas havi grandan nombron da sciencistoj, inĝenieraj kaj teknikaj specialistoj unuaklasaj en la mondo kaj devas rompi rutinojn por trovi, elekti kaj kulturajn eminentajn talentulojn.

Vicĉefministro Fang Ji en sia raporto faris klarigon pri la “Skizo de Tutlanda Plano por Disvolvo de Scienco kaj Tekniko 1978-1985 (projekto)”. Li diris, ke laŭ la okjara plano oni devas doni elstaran pozicion al ok sintezaj sciencajn kaj teknikajn kampoj rilatantaj al la tuta situacio, kaj ĉefaj branĉoj en novaj gravaj teknikajn kampoj: agrikulturo, energiaj rimedoj, materialoj, elektronikaj komputeroj, lasero, spaca scienco, altenergia fiziko kaj genetika inĝenierado, koncentri ĉiujn fortojn, por atingi elstarajn sukcesojn en tiuj ok kampoj, kaj akceli per tio altrapidan disvolvon tiel de la tuta scienco kaj tekniko kiel de la tuta nacia ekonomio. Li diris, ke realigo de tiu plano povos proksimigi aŭ atingigi parton de la gravaj sciencajn kaj teknikajn



Partoprenantoj de la konferenco atingis Pekinon.

kampoj de Ĉinio al la monda avangarda nivelo de la 70-a jardeko.

Tiuj paroladoj multege kuraĝigis la reprezentantojn, precipe tiuj de Prezidanto Hua kaj Viceprezidanto Deng kvazaŭ matena roso kaj printempa pluvo akvumis iliajn korojn. Multe liberiĝis la politika ideologio, revigliĝis la spirito

kaj altiĝis la batalvolo. Sed restas ankoraŭ freŝa ilia memoro pri la persekutado de la “kvarpersona bando” al ili. La abomeninda bando diraciis, ke “ju pli multe oni legscias, des pli reakcia li estas”, “preferinda estas laborulo malklera” kaj kalumniis nomis la mensajn laborantojn sin okupantajn per scienca esplorado “spiritaj aristo-



Sciencistoj en ĝoja renkontiĝo

kratoj” kaj ilin persekutadis. Kiom multe da laboratorioj estis fermitaj kaj kiom multe da esploradoj estis interrompitaj en tiuj tagoj kovritaj de nigraj nuboj!

Nun, jam forpasis por ĉiam la tempo, kiam tiranis la “kvarpersona bando”. Ĉiuj reprezentantoj kun granda entuziasmo decidis fari pli da kontribuoj, por frue realigi la deziron de Prezidanto Maŭ kaj Ĉefministro Ĝoŭ — la kvar modernigojn de la patrolando.

Famaj sciencistoj Kian Hjuesen kaj Ĝu Guangja retrorigardis la batalan vojon de la teknika disvolvo de la nova Ĉinio. En la 50-a jardeko, al Ĉinio tre mankis homa kaj materia fortoj, sed sub la kora zorgado de Prezidanto Maŭ kaj rekta gvidado de Ĉefministro Ĝoŭ, la ĉina popolo jam sukcese fabrikis atomkaj hidrogen-bombojn kaj lanĉis sputnikojn en nur iom pli ol dek jaroj. Kaj nun sub la ĝusta gvidado de la Centra Komitato de la Partio kun Prezidanto Hua kiel la ĉefo, la saĝa, laborema kaj brava popolo povas plene mobilizi sian aktivecon de ĉiuj flankoj, tiel ke realigi la kvar modernigojn kaj superi avangardan nivelon de la mondo ne estos vanta babilaĵo sed historia certajo. Tio tiel emociis ilin, ke ili eĉ ne povis endormiĝi. K-do Kian elmetis en nokto dek proponojn por disvolvi la ĉinajn sciencojn kaj teknikon.

La 90-jara Profesoro He Gie estas fame konata geologo. Liaj lernantoj troviĝas tra la lando, kaj 12 el ili ĉeestis la sciencan konferencon. La profesoro diris al siaj lernantoj, ke malgraŭ la maljuneco li tamen ankoraŭ volas fari kontribuon en geologio, kaj ke li esperas propraokule



Reprezentantoj de la Ĉina Akademio de Sciencoj diskutas en grupa kunveno.

vidi la efektivigon de la kvar modernigoj de la patrolando en la jaro 2,000.

Pluraj specialistoj pri komputero ĉeestantaj la konferencon varme diskutis pri la vasta perspektivo de disvolvado de niaj komputeroj. K-do Gaŭ Kingŝi estas tiuflanka specialisto elkulturita post la Liberiĝo. Antaŭ la konferenco li skribis kvin traktatojn al la konferenco. Aŭskultinte la paroladojn de Prezidanto Hua kaj Viceprezidanto Deng, li decidis kiel oble plej rapide superi la internacian avangardan nivelon en projektado de integra funkcio de komputeroj.



La fama fizikisto Kian Hjuesen en grupa kunveno

Scienco estas parto de produktaj fortoj. La heroa Daĝaj-brigado sinsekve kreis novajn rekordojn kaj ĝia totala produktokvanto de greno kreskis de 100,000 kg. en la frua periodo de la kooperativigo ĝis ĉ. 500,000 kg. en la pasinta jaro. Tamen ĝiaj reprezentantoj opiniis, ke la brigado multe distancas de la altnorma agrikultura modernigo. Kaj ili decidis pli bone disvolvi sciencon esploradon kaj fari ĉiujare novan kreon por fari ankoraŭ pli grandan kontribuon por altrapide disvolvi la agrikulturan produkton.

K-do Ĉeng Joŭĝi, intelekta junulo fiksloĝanta en Venkjuan-brigado de Ĝuolu-gubernio ĉe la

bordo de Sanggan-rivero, nun fariĝis indiĝena specialisto. Li faris al malalttiga maizo eksperimentadon de kulturado en la Nordo kaj generado en la Sudo 20 fojojn dum 9 jaroj. Dank' al tio li kulturis nombrojn da tute novaj hibridaj specoj de malalttiga maizo, kies plej alta produktokvanto pomua atingis pli ol 1,100 kg. Juan Longping, agronomia esploranto de Hunan-provinco, iam faris ĝojindan kontribuon en riza hibridigado sub la zorgo de Kamarado Hua Guofeng. Tiuspeca hibrida rizo jam estis plantitaj pasintjare en pli ol 32,000,000 muoj da tero (1 muo = 1/15 hektaro) de la lando kaj la totala produktokvanto estis plimultigita je 2,000,000,000 kg. En tiu ĉi konferenco ambaŭ ili entuziasmplenaj decidis trovi novan vojon de semkulturado, por ke oni havu novan impeton en kulturado de maizo kaj rizo.

Pli-ol-80-jara prezidanto de la Ĉina Akademio de Sciencoj Guo Moĵuo ĉeestis la Tutlandan Sciencon Konferencon malgraŭ sia malsano. En la ferma ceremonio de la konferenco oni legis, por li, la tekston de lia parolado titolita "Printempo de Scienco", en kiu li entuziasmplene huraas pri la alveno de printempo de la ĉina scienco. Lia parolado estis de tempo al tempo interrompita de manklakado.

En la Tutlanda Scienca Konferenco, laŭdon ricevis 826 avangardaj kolektivoj, 1,192 progresintaj sciencaj kaj teknikaj laborantoj, tiuj unuoj kaj personoj kiuj kreis 7,657 elstarajn sciencajn kaj teknikajn fruktojn, kaj la Partio kaj la ŝtato premiis ilin per honoraj diplomoj.

Eksterlandaj Esperantistoj en Ĉinio

En aprilo kaj majo la kamaradoj de nia redakcio renkontiĝis kun geesperantistoj el kvar landoj: Italio, Nov-Zelando, Japanio kaj Usono.

Italaj geesperantistoj ges-roj Tac-cani jam vizitis Ĉinion en aprilo, 1976, kaj nun ili faris la dua-fojan viziton. Por novzelanda esperantistino s-ino Lymburn ŝia vizito estis

la triafoja en la daŭro de kvar jaroj. Okaze de tiu ĉi denova intervidiĝo ni ĉiuj sentis eksterordinaran ĝojon kiel malnovaj amikoj rememorante la pasintan renkontiĝon.

Ni ankaŭ intervidiĝis kun novzelanda esperantistino s-ino Bouter, japana esperantisto s-ro Sinzo Sumija kaj usonaj geesperantistoj ges-roj Weiner por la unua fojo.

Tamen, super ni regis tiel varma kaj amikeca etoso, ke la renkontiĝo ŝajnis esti iner amikoj antaŭ longe konatiĝintaj unuj kun la aliaj.

Nia redakcio ĉiam bonvenigas la viziton de eksterlandaj esperantistoj al nia lando, ĉar tio ebligas al ni pliantaŭenigi reciprokajn komprenon kaj amikecon. Tio ankaŭ montras la efikan rolon de Esperanto por la amikigo de diverslandaj popoloj.

Nova aspekto de la ĉina eduka fronto

LASTATEMPE, sur la ĉina eduka fronto aperis nova situacio. Laŭ bezono de konstruado de moderna socialisma potenco kaj spertoj akiritaj en la pasinteco, la eduka departemento faris multajn reformojn al sia laboro. La diversgradaj kaj diversspecaj lernejoj jam likvidis la ĥaoson kaŭzitan de la “kvarpersona bando” kaj iom post iom suriris la norman vojon. Aktiveco de la instruistoj estas plene disvolvata; la geknaboj kaj gejunuloj diligente studas kaj aktive aplikas sciencajn sciojn, kaj la publika opinio aprobe ilin laŭdas.

Subfosado de la “kvarpersona bando”

En la pasinteco, la “kvarpersona bando” serioze subfosis la edukan aferon de nia lando.

Ekzemple, la ĝenerala celo de lerneja edukado difinita laŭ la principo elmetita de Prezidanto Maŭ estas “ebligi al la edukatoj disvolviĝi morale, intelekte kaj korpe kaj fariĝi kleraj laboruloj kun socialisma konscio”. Sed la “kvarpersona bando” elmetis la absurdan tezon “preferindaj estas malkleraj laboruloj ol kleraj spiritaĵoj aristokratoj”, metante laborulon kun socialisma konscio en pozicion kontraŭ klereco. Ĝi distrumpetis Ĝang Tieŝeng, kiu fuŝe plenumis taskojn de altlerneja enira ekzameno, kiel “heroon starantan kontraŭ la fluo”, kaj sekve de tio la lernantojn inundis la erara penso, ke lernado estas senutila. Kaj krome, la bando agitis lernantojn oponi kontraŭ siaj instruistoj, laŭdante kritikon de iu lernantino al instruisto en sia taglibro kiel kritikon al “digneco de la instruistoj”, kio multe malbonigis la interrilaton inter la instruistoj kaj lernantoj kaj perturbis la

instruadon de multaj lernejoj. Ni prezentu la demandon “funkciigi lernejon kun malfermita pordo” kiel alian ekzemplon. Tiu simpla kaj figureca slogano estis elmetita de instruistoj kaj lernantoj en la Granda Proleta Kultura Revolucio. Ĝi komformas al la eduka principo de Prezidanto Maŭ, ke edukado kombiniĝu kun produkta laboro, teorio kombiniĝu kun praktiko kaj la instruistoj kaj lernantoj kombiniĝu kun laboristoj kaj kamparanoj. Sed la “kvarpersona bando” oponis kontraŭ studado svingante tiun flagon kaj distrumpetis, ke “ju pli larĝe malfermita estas la pordo de la lernejoj, estas des pli bone” kaj “ju pli longe oni fiziklaboras, estas des pli bone”. Pro longa partopreno en produkta laboro en fabrikoj kaj kamparo, la instruistoj kaj lernantoj perdis multan tempon por lerni fundamentajn studobjektojn, kaj sekve de tio serioze malaltiĝis la kvalito de la instruado.

La “kvarpersona bando” estis riproĉita de la popolo pro ĝia subfosado al la eduka revolucio. Kiam Ĉefministro Ĝou Enlaj komencis, en 1972, ordigi la edukan fronton, laŭ instrukcio de Prezidanto Maŭ, la “kvarpersona bando” ekatakis per kulpigoj pri “kapitalisma restaŭro” kaj “retrofluo de reviziisma linio”, direktante sian lancpinton al Ĉefministro Ĝou. Kiam Viceprezidanto Deng Hiaŭping elmetis, en 1975, sian opinion pri ordigo de edukado, laŭ instrukcio de Prezidanto Maŭ, la “kvarpersona bando” faris frenezan kontraŭatakon kulpigante pri “ŝanĝo de la eduka revolucio”. En tiu tempo, la batalo inter la du linioj sur la eduka fronto estis ekstreme akra.

Nun, la “kvarpersona bando” estas jam tute frakasita, kaj la eduka afero de Ĉinio triumfe



Profesoro Jiang Minggao de fakultato de la ĉina literaturo de la Siĉuan-a Universitato kune kun junaj instruistoj kompilas "Antologion de Song-dinastio".

antaŭen marŝas laŭ la eduka linio de Prezidanto Maŭ.

Disrompo de spirita kateno

Ankoraŭ alia afero estas aparte menciinda, nome la "kvarpersona bando" elkovis la t. n. "du taksojn" en 1971.

Unu el ili asertas, ke la eduka linio de Prezidanto Maŭ "estas fundamente ne plenumata" en la periodo de la fondiĝo de la popola respubliko en 1949 ĝis la komenciĝo de la Granda Proleta Kultura Revolucio en 1966 kaj en la edukaj rondoj "burĝoj diktaturas super proletoj"; la alia asertas, ke la plejparto de la instruistoj kaj la studentoj kulturitaj en tiu periodo estas "burĝaj intelektuloj". Ili kriaĉis, ke kiu oponas kontraŭ la "du taksoj", tiu "oponas kontraŭ la kultura revolucio". Kaj ili publike postulis, ke oni "agu kontraŭe al tiuj 17 jaroj".

La absurdaj "du taksoj" forte vundis la revolucion aktivecon de la kadroj kaj instruistoj, fariĝis spirita kateno sur la vasta intelektularo kaj serioze malhelpis la disvolviĝon de la eduka afero. Kvankam la "kvarpersona bando" estas jam faligita, tamen la "du taksoj" ankoraŭ katenis la revolucion aktivecon de la edukaj laborantoj kaj malhelpis fruan elkulturon de multaj talentuloj por efektiviĝi modernigon de agrikul-

turo, industrio, nacidefendo kaj scienco kaj tekniko. Nun laŭ instrukcioj de Prezidanto Hua Guofeng kaj la Centra Komitato de la Partio, la edukaj rondoj estas farantaj kritikon al la "du taksoj".

Kiel oni devas taksi la ĉinan edukon aferon kaj la intelektulojn en la 17 jaroj antaŭ la kultura revolucio? Frue en 1957 Prezidanto Maŭ jam diris, ke en nia lando "jam aperis senprecedence prospera situacio ĉu en ekonomio, ĉu en kulturo, edukado kaj scienca afero". La eduka principo elmetita de Prezidanto Maŭ en la jaro 1958 pli klare montris la direkton por la eduka revolucio de Ĉinio. En tiu tempo, vigla eduka revolucio leviĝis tra la tuta lando kaj en multaj lernejoj ekstarigis nova sistemo de instruado, produktado kaj scienca esploro en kombino. En 1964, Ĉefministro Ĝoŭ montris en sia raporto pri la registara laboro al la Tria Tutlanda Popola Kongreso: "En la lastaj jaroj, ni plibonigis la instruan laboron kaj altigis la kvaliton de la eduka laboro, laŭ la principo servigi edukadon al proleta politiko kaj kombini edukadon kun produkta laboro."

Laŭ statistiko de koncernaj fakoj, antaŭ la kultura revolucio, la nombro de altaj lernejoj grandiĝis ĝis pli ol 400 dum tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo estis nur iom pli ol 200;

la lernantoj multiĝis de 25,000,000 ĝis pli ol 130,000,000; malpli ol 10% de la lernantoj en la altaj lernejoj devenis de familioj de ekspluatantoj, kaj pli ol 75% de la mezlernejoj estis gefiloj de laboristoj kaj kamparanoj; la eduka kvalito senĉese altiĝis, granda nombro da kapablaj laborantoj estis elkulturitaj, inter kiuj multaj jam fariĝis ĉefforto sur diversaj frontoj.

Antaŭ ĉio ĉi tio, kiel oni povas diri, ke la eduka linio de Prezidanto Maŭ fundamente ne estis plenumata en la 17 jaroj antaŭ la kultura revolucio? Kiel oni povas diri, ke la studentoj elkulturitaj en tiu periodo estas burĝaj intelektuloj? Eĉ plejparto de la instruistoj venintaj de la malnova socio progresis rimarkeble dank' al longa politika lernado kaj hardado post la Liberiĝo, kaj ludis aktivan rolon en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado. Estas vere, ke antaŭ la Granda Proleta Kultura Revolucio, ekzistis tendenco en edukado disiĝi de la realo kaj fizika laboro kaj neglekti politikon, pro ĝenado de la reviziisma linio de Liu Ŝaŭki, kaj krome la lernoperiodoj estis tro longaj, la lernobjektoj tro pezaj, la instrua metodo ne tre taŭga kaj en ekzamenoj oni elmetadis maloftajn kaj

kuriozajn demandojn. Komence de la kultura revolucio, Prezidanto Maŭ elmetis la grandan alvokon "revolucio devas esti farita en edukado" por likvidi la linion de Liu Ŝaŭki.

En la kultura revolucio, Prezidanto Maŭ foje diris, ke la fenomeno de regado de burĝaj intelektuloj super lernejo ne devas ekzisti plu. Per tio Prezidanto Maŭ kritikis fenomenon de apartaj lokoj, sed la "kvarpersona bando" intence tion ĝeneraligis, kun kaŝita celo, kiel tutlandan fenomenon.

En somero de 1971, Prezidanto Maŭ refutis la absurdajn asertojn de la "kvarpersona bando" pri la "du taksoj". Li diris, ke oni ne devas subtaksi la 17 jarojn, kaj la plejparto de la intelektuloj aprobas socialismon. Tamen la "kvarpersona bando" lerta en intrigado strikte blokadis la instrukcion de Prezidanto Maŭ kaj ne lasis la publikon ĝin ekscii.

En oktobro de 1977, kiam Prezidanto Hua donis instrukcion pri kritiko al la "du taksoj", stimuliĝis la tuta lando. Kiam la grava artikolo de la kritika grupo de la Eduka Ministerio "Granda Debato sur la Eduka Fronto" estis

Novaj studentoj de la Pekina Pedagogia Universitato en la biblioteko





Profesoro Jaŭ Conggong (maldekstre) de la Hin-hiang-a Pedagogia Instituto faras analizon de kemia strukturo de kontraŭkancera medikamento.

disaŭdigata, multaj instruistoj emociiĝis ĝis larmoj ĝin aŭskultante, kaj la vastaj amasoj de instruistoj kaj intelektuloj estis kuraĝigitaj kaj ĝojigitaj. Tuj sekve, mitingoj okazis en diversaj lokoj de la tuta lando, por indigne kondamni la krimon de la “kvarpersona bando” en subfoso de la eduka afero, tiel ke granda ŝanĝo okazis al la spirita fizionomio de la laborantoj sur la eduka fronto.

Ordigo kaj reformo

Post la frakaso de la “kvarpersona bando”, la Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Hua multe atentis pri la disvolviĝo de la kultura, eduka kaj scienca aferoj. Ĝi prenis malkaŝadon kaj kritikadon de la “kvarpersona bando” kiel ĉefĉeneron por distingi la ĝustan linion de la erara kaj aplikis efikajn rimedojn por ordigi kaj reformi la edukon laboron.

Antaŭ ĉio, oni faris reguligon kaj plifortigon al la gvidantaro de parto de la lernejoj. Nun la Centra Komitato de la Partio decidis ne starigi revolucionan komitaton en la lernejoj kaj restarigis la sistemon de lernejestra prirespondo sub la gvido de partia komitato por plifortigi la unuecan gvidadon de la Partio al la lernejoj kaj lasi la administrajn kadrojn en la lernejoj plene ludi

sian rolon. Ĉie oni serioze plenumis la politikon de la Partio kaj registaro koncerne al la intelektuloj, kunvokis kunvenojn de avangardaj instruistoj kaj premiis la kadrojn kaj instruistojn, kiuj faris kontribuon al la eduka afero. Tio pliapaŝe movis la aktivecon de la kadroj kaj instruistoj en eduka laboro.

En 1977, reformo estis farita al la sistemo de enira ekzameno de altaj lernejoj. La enira ekzameno en tiu jaro diferencis de la antaŭaj per tio, ke en ĝi povis partopreni ĉiuj lernantoj de supera mezlernejo diplomitaj en la periodo de la kultura revolucio, abiturientoj, kaj ankoraŭ nediplomitaj mezlernejanaj rekomenditaj de siaj lernejoj pro elstara atingo en lernado. Tia aranĝo celis ebligi al la ŝtato multe elekti kaj kulturi talentulojn por la socialisma konstruado. Alia karakterizaĵo de tiu ekzameno estis tio, ke oni emfazis ĉiuf flankan kontrolon pri la moralo, intelekto kaj korpo de la kandidatoj, metante ekzamenon pri kulturaj scioj sur gravan lokon. Tio povas kaj garanti la kvaliton de la varbitaj novaj studentoj kaj stimuli la gejunulojn diligente lernadi sciencajn kaj kulturajn sciojn laŭ ĝusta politika direkto. Kaj krome, en elektado de novaj studentoj por agronomiaj, medicinaj kaj pedagogiaj altaj lernejoj, prioritato estis donita al elstaraj agronomiaj aktivuloj, nudpiedaj kuracistoj kaj instruistoj en popolaj lernejoj. Favora konsidero estis donita ankaŭ al gejunuloj de nacimallimultoj kaj ĉinaj gejunuloj venintaj de Tajvan-provinco, Hongkongo, Aŭmen kaj fremdaj landoj. La reformo ricevis varman subtenon de la tutlanda popolo, kaj milionoj da gejunuloj partoprenis en tiu ekzameno.

Reformo estis farita ankaŭ al la lernoperiodoj kaj studobjektoj. Antaŭ la kultura revolucio, la lernoperiodo de iuj natursciencaj altaj lernejoj longis je 6-8 jaroj, dum tiu en la periodo de la kultura revolucio estis mallongigita ĝis 3 jaroj. Nun, la lernoperiodo de altaj lernejoj estas ĝenerale 4 jaroj, kaj tiu de malmultaj el ili, kiel ekzemple medicinaj institutoj, povas esti longigita ĝis 5 jaroj. Antaŭ la kultura revolucio, la lernoperiodo de elementaj lernejoj estis 6 jaroj, kaj tiu de la unua- kaj dua-gradaj mezlernejoj estis po 3 jaroj. Dum la periodo de la kultura revolucio, la lernoperiodoj de diversaj lokoj

malsamiĝis. Nun, en la “Projekto de Instrua Plano de Tuttaga Dekjara Lernejo” publikigita de la Eduka Ministerio estas difinite, ke la lernoperiodo de elementa lernejo estas 5 jaroj, tiu de la unua-grada mezlernejo 3 jaroj kaj tiu de dua-grada mezlernejo 2 jaroj. Kaj krome, la edukaj institucioj organizis kompetentulojn de diversaj fakoj por verki lernolibrojn por la elementaj kaj mezgradaj lernejoj de la tuta lando, por ke la plej novaj sciencaj kaj teknikaj scioj estu instruataj al la gejunuloj, kaj ekde la venonta aŭtuno unuecaj lernolibroj estu uzataj tra la tuta lando.

En reformo de instruado, emfazo estas metita al ĝusta plenumo de la principo de kombino de edukado kun produkta laboro kaj al serioza praktikado de la principo elmetita de Prezidanto Maŭ, ke la lernantoj “prenu sinklerigadon kiel la ĉefan taskon kaj ankaŭ lernu aliajn aferojn samtempe”. Plenumante la instruan planon, la elementaj kaj mezgradaj lernejoj devas, laŭ la aĝoj de la lernantoj, fariĝi al ili konvenajn korpajn laborojn, por ke ili amu laboron kaj la laborantan popolon ekde sia juneco kaj povu bone fari intelektan kaj korpan laborojn. La altaj lernejoj kaj fakaj lernejoj devas doni ankoraŭ pli grandan atenton al tio, ke la studentoj partoprenu en fizika laboro en ligo kun sia stu-

data fako, por ke ili pli profunde komprenu la lernitan teorion. Emfazata estas ankaŭ tio, ke al la studentoj devas esti instruitaj fundamentaj scioj kaj fundamentaj teorioj, kaj la altaj lernejoj devas restarigi la fakon pri fundamentaj studobjektoj por plifortigi la studon kaj instruadon de fundamentaj teorioj. Por plenumi disvolvi la lernantojn morale, intelekte kaj korpe, la eduka fako ankaŭ fiksas la longecon de la instrua tempo kaj la totalan kvanton de enlerneja aktivado de la lernantoj por la tuta lando.

La Eduka Ministerio ankaŭ decidis restarigi kaj bone funkciigi nombrojn da gravaj lernejoj, por rapide altigi la edukan nivelon. Nun oni jam difinis la unuajn 88 gravajn altajn lernejojn inkluzive de 28 novaj, kaj en la estonteco la nombro de tiaj lernejoj estos pligrandigita laŭ necesaj kondiĉoj. 20 gravaj elementaj kaj mezgradaj lernejoj estas difinitaj por la tuta lando, kaj ankaŭ diversaj lokoj difinos, laŭ la lokaj kondiĉoj, siajn gravajn elementajn kaj mezgradajn lernejojn.

La Tutlanda Scienca Konferenco donis fortan akcelon al la eduka afero, kaj la vastaj amasoj de edukaj laborantoj kaj instruistoj fariĝis ankoraŭ pli entuziasmaj kaj decidis fari novajn paŝojn en la eduka laboro.



Profesoro Vu Ŝaŭkuj (la dua de dekstre) de la Henan-a Agromonia Instituto atingis sukceson en kulturado kaj disvastigo de bonaj semoj de maizo.

La reformita varbado de studentoj


LA varbado de la altaj lernejoj de Ĉinio de 1977 estis farita en jenaj paŝoj: memvola kandidatigo, kultura ekzameno kaj unuapaŝa selektado, laŭ la principo akcepti la elstarajn en moralo, intelekto kaj fizika kvalito. La ekzamenitaj kandidatoj nombriĝis pli ol 5,700,000 inter kiuj estis abiturientoj de post la komenco de la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj aliaj gejunuloj kun kultura nivelo egala al tiu de abiturientoj. Tial la varbado estis la plej vasta en la pasintaj pli ol dek jaroj en Ĉinio.

Multaj talentuloj trovitaj

Tra la ekzameno oni trovis multajn talentulojn, el kiuj iuj povis solvi ne nur la necesajn ekzamenajn demandojn, sed ankaŭ la aldonitajn; aliaj jam atingis la kulturen nivelon de unuaŭ dua-klasaj studentoj kaj triaj certgrade scipovas plurajn fremdajn lingvojn. La akceptitaj novaj studentoj kun kompare alta kultura nivelo kontentigis la postulojn de kompleta disvolvo en moralo, intelekto kaj fizika kvalito.



*Novaj studentoj de
Kinghua - universita-
to en leciono*



Novaj studentoj de la Pekina Fizikkultura Instituto

Kinghua-universitato de Pekino akceptis de la tuta lando pli ol 800 novajn studentojn kun meznombra aĝo de 20 jaroj, inter kiuj 83% estas kompartianoj aŭ membroj de la Komunisma Junulara Ligo. La notoj de ili ricevitaj en la matematika kaj fizika ekzamenoj plejparte superis 80 poentojn. Unu el la studentoj akceptitaj de la nomita universitato estis laboristo de la Kingdaŭ-a Transistora Eksperimenta Instituto. Kun praktika sperto kaj relative bona bazo en esplorado de likvokristala indikado li lastjare sukcese provfaris koloran likvokristalan ciferan indikatoron, kiun la koncerna fako de Ŝandong-provinco sendis al la Tutlanda Scienca Konferenco kiel premian objekton.

La instruistoj sentis neeldireblan ĝojon pro trovo de tiel multaj talentuloj en la ekzameno, same kiel la kamparanoj pro riĉa rikolto de greno. Ili diris ke, havante tiel multnombrajn talentulojn kiel daŭrigantojn de la revolucia afero, nia lando certe povos surgrimpi pinton de scienco kaj teknikoj kaj efektiviĝi la projekton de kvar modernigoj.

De 1977, la altaj lernejoj de nia lando reformis la sistemon de lernotempo. Laŭ la nova sistemo la studentoj ĝenerale devas lerni kvar jarojn, kaj tiuj de medicina instituto kvin jarojn. Sekve de tio, la altaj lernejoj faris novajn edukajn planojn kaj instruajn programojn, en kiuj klare prezentiĝas postuloj al la studentoj en moralo, intelekto kaj fizika kvalito. Ili aparte emfazis la instruadon pri sciigo de fundamentaj teorioj, fundamentaj fakaj sciigoj kaj fundamentaj teknikoj. La Hi-an-a Giaŭtong-universitato, fame konata antaŭ la Granda Proleta Kultura Revolucio pro emfazo pri fundamentaj teorioj kaj la kvalito de instruado kaj lernado, restarigis la departementon de fundamentaj teorioj, ĝiaj pli ol 400 instruistoj transpostenigitaj al diversaj fakoj nun revenis al la departemento kaj entuziasme komencis instruadon kaj esploron, multaj el ili diligente preparis instruotaĵojn eĉ en vintraj ferioj. Ĉa Kjuanhing, vicprofesoro de la Kemia Fakultato de Vuhan-universitato, diris, ke samtempe kun bona farado de esplorado pri la fundamentaj teorioj de elektrokemio, li



*Profesoro Jang Ĉengzong de la Scienca kaj
Teknika Universitato inter geknabaj studentoj*

restarigos la instruajn eksperimentojn de fakaj kursoj kaj bone instruos la studentojn en tio.

La Ĉengdu-a Geologia Instituto kompilis kaj presis 26 specojn de instruaj materialoj por la novaj studentoj de 14 fakoj. Tiuj materialoj kompilitaj sisteme kaj science kun klara celo ankaŭ laŭeble aplikis novajn teoriojn, teknikojn kaj metodojn en kaj ekster la lando.

Geknaba kurso de la Scienca kaj Teknika Universitato

Dank' al rekomendo de amasoj kaj ĉeloka enketo de koncernaj personoj, oni trovis, en la ekzamenado, nombron da knaboj lernemaj kun fortaj komprenivo kaj memorivo kaj altaj notoj, kies klereco multe superis tiun de la samaĝuloj. Pro ke ilia aĝo ne konformas al la reguloj de la varbado de studentoj, la Ĉina Scienca kaj Teknika Universitato speciale starigis preparan kurson por lernigi al ili fundamentajn sciojn, kaj poste faros al ili fakan kulturadon laŭ ilia lerteco en apartaj fakoj.

Iu akceptita 14-jara lernanto de la Ŝanhaja 10-a Mezlernejo forte interesiĝis pri matematiko. Li mem finlernis la matematikon de supera mezlernejo kaj solvis milojn da matematikaj problemoj. Ĉifoje en la ŝanhaja ekzamena distrikto li solvis la matematikajn problemojn kaj la aldonitajn demandojn en malpli ol unu horo. La Ĉina Scienca kaj Teknika Universitato sendis instruistojn al Ŝanhajo por fari al li specialan ekzamenon. Unue oni donis ok matematikajn problemojn, sep el kiuj la knabo solvis en unu horo, kaj poste ili ekzamenis lin per kvar pli malfacilaj problemoj, ankaŭ kiujn li solvis senerare. La du ĉefaj ekzamenantoj de la matematika fakultato opiniis, ke la knabo havas bonan matematikan bazon kaj rapidan penson, povas lerte operacii kaj solvi problemojn senerare.

En la lasta oktobro, la Ĉina Akademio de Sciencoj ricevis leteron el Gianghi-provinco, kiu jene rekomendis 13-jaran lernanton de dua klaso de supera mezlernejo de la urbo Ganĝoŭ: La knabo en sia dujara aĝo jam povis reciti pli ol



Novaj studentoj de la Pekina Universitato rigardas la meĥanikan laboratorion de ĝenerala fiziko.

30 poemojn de Prezidanto Maŭ, en la kvinjara aĝo vizitis elementan lernejon, en la 6-jara aĝo komencis legi medicinajn librojn, konis karakteron kaj uzon de certa nombro da ĉinaj drogherboj kaj pulsan simpton, kaj povis ankaŭ diagnozi malsanojn. Kiam li estis 8-jara, li eklernis astronomion, povis okule distingi dekojn da konstelacioj kaj konis ilian regulan moviĝon en malsamaj sezonoj. Estante 11-jara li komencis ludi *vejĉi*-on, kaj je duon-jaro poste li dufoje gajnis subĉampionecojn de geknaba kaj plenaĝula *vejĉi*-konkursoj de la urbo. Ankaŭ klasikan literaturon li tre ŝatas kaj povas verki klasikajn poemojn. Ricevinte la leteron, la Ĉina Akademio de Sciencoj tuj raportis tion al koncernaj gvidantoj. La Ĉina Scienca kaj Teknika Universitato sendis du spertajn instruistojn por enketo. Post detala enketo kaj ekzameno oni konstatis, ke la knabo ja posedas neordinarajn komprenan kaj memoran povon kaj sciojn pli multajn ol la samaĝuloj. Nun, li jam estas akceptita en la nomitan universitaton.

Tiaj geknaboj akceptitaj de la Ĉina Scienca kaj Teknika Universitato nombriĝas 20, inter kiuj la plej aĝa estas 16-jara kaj la plej juna nur 11-jara. La varbantoj-instruistoj diris, ke je la unua interviziĝo la knaboj jam tiris al si ilian atenton per siaj diligenta lernado kaj kuraĝo en venko de malfaciloj. Ĉar tiuj knaboj havas kompare altan nivelon de natura scienco, tamen nesufiĉe da bazaj scioj, la universitato kompilis por ili specialajn instruajn materialojn, asignis al ilia kurso instruistojn kun kompare alta instrua nivelo kaj ankaŭ unu instruistinon kun kompare alta instrua kaj politika nivelo kiel ilian respondeculon por ke tiu lasta eduko kaj zorgu ilin en la politika ideologio kaj vivo.

Ĝojo de Maljuna Profesoro

La altaj lernejoj bolis de ĝojo, kiam la novaj studentoj alvenis kaj komencis la novan vivon. Maljunaj profesoroj elkore ĝojis, kiam ili vidis tiujn novajn studentojn lernemajn kun bonaj notoj de ekzameno.

La 6-a de marto estis la unua tago por registrado de la novaj studentoj de Vuhan-universitato. Posttagmeze de tiu tago, iu modesta junulo venis al la legoĉambro de Profesoro Tang Ĉangju. La blankhara profesoro tuj iris renkonte al li, forte premis al li la manon kaj diris emocie: "Bonvenon al vi, malgranda Vang! Mi tre ĝojas, ke vi studos en nia fakultato!" La junulo nomiĝas Vang Su kaj estis karboportisto de Vuĉang.

Vang Su tre ŝatis historion jam en malsupera mezlernejo. Li tralegis historiajn verkojn de Tang Ĉangju kaj plurfoje vizitis lin por peti ties helpon. En la lasta oktobro Vang Su sendis sian studaĵon en memlernado al Profesoro Tang kaj instruisto Guan Venfa. Profesoro Tang tre ĝojis, ke la juna laboristo tralegis tiel multajn librojn en postlaboraj horoj kaj akiris tiel bonan sukceson. Poste li respondis al li per longa letero, en kiu li varme instigis lin aliĝi al la varba ekzameno por fari pli grandan kontribuon en historia esplorado. Post duonjaro Vang Su trapasis la ekzamenon kaj estis akceptita de la Historia Fakultato de Vuhan-universitato. Profesoro Tang tre ĝojis kaj akceptis lin en sia hejmo kune kun Guan Venfa.

La 24-jara Vang Su emocie raportis al la du instruistoj sian diligentan lernadon pri historio

en la pasintaj dek jaroj. Ekde 1969 Vang Su komencis fiziklabori en kamparo post diplomiĝo el malsupera mezlernejo kaj fariĝis laboristo en 1975. En la pasintaj dek jaroj li tralegis multajn historiajn librojn de Ĉinio kaj aliaj landoj. Surbaze de studo pri "Ĉina Historio", li studis la historiojn de Ming-dinastio, politika sistemo, geografia variado kaj antikva astronomio de Ĉinio, kaj ankaŭ faris certan esploron pri klasika literaturo kaj la historio de natura scienco. Li jam akumulis historiajn materialojn kun milionoj da vortoj kaj skribis verkojn kun pli ol 900,000 vortoj. En majo de la lasta jaro, ekzameninte la verkojn alsenditajn de Vang Su, la Historia Instituto de la Ĉina Sociologia Akademio kaj la Instituto de Naturscienca Historio de la Ĉina Akademio de Sciencoj entuziasme instigis tiun junulon kun konsiderinda bazo en historia esplorado aliĝi al varba ekzameno por esti studento aŭ esplora studento kaj ankaŭ sendis al Vuhan specialan personon por lin helpi.

Profesoro Tang Ĉangju diris tre emocie: Sub la gvido de la Centra Komitato de la Partio kun Prezidanto Hua kiel la ĉefo, la ŝtato ordigis la edukan sistemon kaj praktikis novan varban metodon, tiel ke la gejunuloj volantaj diligente studi sciencojn kaj kulturon povas kreski sub zorgo kaj edukado de la Partio. Tio vere estas ĝojinda afero.



Vicprofesoro Vang Ji-nuan (dekstre) de la lingva kaj literatura fakultato de la Nordokcidenta Nacinalplimulta Instituto kune kun tibetaj instruistoj kompilas "Historion de la Tibeta Literaturo".

GI FANG:

En la Unua Mezlernejo de Ŝigiaĝuang

EN frua printempo, mi vizitis la Unuan Mezlernejon de Ŝigiaĝuang. Enirinte ĝian pordegon, mi tuj aŭdis voĉlegadon de lernantoj en la klasĉambroj de etaĝdomo en la nordo. Respondeculo de la lernejo diris al mi, ke la lernantoj legas fremdan lingvon. Post la frakaso de la “kvarpersona bando”, ĉiam pli intensiĝis la studa etoso en la lernejo kaj la instruado normaliĝis. Sub lia gvido mi pririgardis la ekipaĵojn de la lernejo kaj li prezentis al mi la ĝojindajn ŝanĝojn en la lernejo en la pasinta pli ol unu jaro.

Ŝanĝiĝo de la lernogrupo

Kiam finiĝis la lasta semestro de la pasinta jaro, la lernejo restarigis la sistemon de promociado de lernantoj. Laŭ la regularo, pli ol 30 gelernantoj de la duajara klaso ne povis eniri la triajaran klason. La gvidantoj kaj instruistoj foje kaj refoje interkonsiliĝis pri metodoj por helpi tiujn postiĝintajn lernantojn. Fine ili decidis formi apartan lernogrupon el ili kaj asignis spertan instruiston Hju Dejue prizorgi ĝin. Kaj tiu nova lernogrupo fariĝis la 9-a aldona al la antaŭaj 8 lernogrupoj.

Kiam Hju Dejue eniris la klasĉambron de la 9-a lernogrupo je la tago de ĝia fondiĝo, li vidis ke la mebloj estis en malordo, iuj el la lernantoj laŭte babilis kaj ridis, aliaj petolis unuj postkurante aliajn, simile al incitita abelujo. Li faris kontrolon kaj konstatis, ke nur 26 el la lernantoj ĉeestis. Li komprenis la kontraŭdiran animstacion de la postiĝintaj lernantoj, ne riproĉis ilin, sed anstataŭe pacience kuraĝigis ilin por fariĝi bonaj lernantoj plene disvolviĝintaj en moralo, intelekto kaj fiziko.

Komenciĝis la somera libertempo. En tiu tempo Hju vizitis unu post alia la hejmon de la lernantoj almenaŭ dufoje kaj maksimume 6-foje. Li detale informiĝis pri la stato de ilia familio, la kondiĉo por lernado, ilia pozicio en la familio kaj la influoj de ilia medio. Multaj iliaj eksĉefinstruistoj prezentis al Hju iliajn ĉefajn bonajn kaj malbonajn ecojn kaj analizis kune kun Hju la kaŭzojn de ilia malbona lernado.

Plejparto de tiuj lernantoj komencis sian vizitadon al elementa lernejo en 1970. Kiam ili lernis en la triajara klaso, la “kvarpersona bando” dispropagandis Ĝang Tieŝeng, kiu fuŝe plenumis respondojn en enira ekzameno de altaj lernejoj, kiel “heroon starantan kontraŭ la fluo”, kaj poste agitis lernantojn ribeli kontraŭ siaj instruistoj, per publikigo de fragmentoj el taglibro kaj letero de iu knabineto de elementa lernejo, kiu kritikis sian instruiston. Sekve de tio, estiĝis pensa ĥaoso en la lernejoj kaj la socio kaj malfortiĝis la disciplinemo de la lernantoj. De tiam, la animo de la geknaboj veneniĝis tiel, ke ili ne povis distingi pravon de malpravo kaj honoron de malhonoro. Tio estis la ĉefa kaŭzo. Kaj krome, la gepatroj tro dorlotis siajn infanojn kaj ne aplikis ĝustan manieron en edukado. La lernantoj de tiu grupo, escepte de 7 el ili, ĉiuj estas la plej junaj aŭ solnaskitaj infanoj en la respektivaj familioj, vivis en relative granda abundeco, sen rigora postulo de la gepatroj, kaj mankis al ili revolucia idealo.

Kion do oni devis fari en traktado al tiu lernogrupo? La gvidantoj de la lernejo multfoje interkonsiliĝis kun instruisto Hju kaj postulis, ke ĉiuj prizorgu ĝin, nemalestimu ĝiajn lernan-



Observado de spektro



Eksperimentado pri mikroboj en postleciona horo

tojn, ilin eduku en pozitiva maniero kaj veku ilian entuziasmon.

Antaŭ ĉio oni donis atenton pri disciplino dum lecionaj horoj kaj postulis, ke la lernantoj venu en la lernejon kaj prenu lecionojn laŭ la difinita horaro kaj atente aŭskultu prelegojn de la instruistoj. Por tiuj nedisciplinaj lernantoj, eĉ tion fari estis malfacile. En la komenco de tiu semestro, la lernantoj ofte malfruiĝis aŭ forestis sen permeso. Starante ĉe la pordo de la lernejo, Hju demandis ĉiujn malfruiĝintojn pri la kaŭzo, kaj se iu forestis sen permeso, li iris al lia hejmo por serĉi kaj venigi lin. Ĉi-matene kaj ĉi-vespere, la instruistoj rakontis al ili pri detruo de la “kvarpersona bando” al la eduka afero kaj pri la diligenta lernado de la revoluciaj gvidantoj kaj sciencistoj. Post unu monato, fundamente malaperis fenomenoj de malfruiĝo kaj senpermesa forestado. Por plia-paŝe aktivigi la lernantojn, komenciĝis konkurso pri neokazigo de akcidentoj en cent tagoj kaj faro de cent bonaj aferoj. Ĉiu bona konduto, kiel ajn bagatela, estis laŭdata de la instruistoj. Kiam tiuj multe kritikitaj geknaboj estis eklaŭditaj, ili tre ĝojis kaj pli kaj pli multaj el ili faradis bonojn. Surbaze de tio, la instruistoj iom post iom transmetis sian atenton al lernigo de scioj.

Ĉar la fundamento de tiuj lernantoj estis tre mizera, la instruistoj devis ilin helpi pacience kaj zorgeme komencante de ilia efektiva grado, kaj dank’ al tio ne malmultaj el la lernantoj ricevis rimarkeblan progreson. En la semestro-meza ekzameno, tiu grupo havis la kvinan lokon de la tuta klaso, en matematika konkurso ĝi gajnis la kvaran lokon kaj ankaŭ en lernado de la angla lingvo ĝi atingis bonan rezultaton.

Kiom pene la instruistoj klopodis por ŝanĝi la 9-an lernogrupon! Kiam mi demandis al ĝia ĉefinstruisto Hju pri lia sperto, li diris kun rideto, ke la instruistoj ne devas fari diskriminacion al postiĝintaj lernantoj, sed pacience ilin helpi, ĉar ili estas gefiloj de laborantaj popolanoj kaj konstruantoj de la estonta Ĉinio, kaj oni povas trovi kaj vekti ilian aktivecon en esenco, nur se oni kontaktas ilin kaj vere konas ilin kun profunda amo. Jes ja, en tiu instruisto mi ekvidis la profundan signifon de la honora titolo “diligentaj ĝardenistoj” por instruistoj.

Vigla instruado

La nomita mezlernejo estas la plej frue fondita mezlernejo de Ŝigiaĝuang. Ĝi estas relative

granda kaj ekipita per diversaj eksperimentaj bezonaĵoj kaj bonaj instruistoj. En la pasinteco, ĝi multe atentis pri instruado de fundamentaj sciencoj, teorioj kaj teknikoj, elkulturis multajn elstarajn lernantojn plene disvolviĝintajn en moralo, intelekto kaj fiziko kaj famiĝis pro sia alta eduka kvalito en la tuta urbo kaj la tuta Hebej-province. En la tagoj, kiam tiranis la “kvarpersona bando”, ĝi tamen estis multe riproĉita kaj kulpigita kiel “trezora pagodo” kaj pledanto por “intelekteco en la unua loko”, kaj la instruistoj sentis indignon en la koro pro tio, ke ili ne povis labori, tamen ne kuraĝis eldiri sian senton. Tuj fundamentaj sciencoj estis eliminataj el la lernolibroj, en fizikaj lecionoj oni povis instrui nur pri dizelo, elektra motoro, traktoro kaj pumpilo, kaj la eksperimentoj estis anstataŭitaj per lecionoj de fizika laboro, sekve de kio la eksperimentaj instrumentoj ne plu estis uzataj.

En 1972, en la ĵurnalo Lumo publikiĝis artikolo “Opinioj pri la Eduka Revolucio al la Fakultato de Naturaj Sciencoj de Universitato” verkita de profesoro Ĝou Pejĵuan de la Pekina Universitato. En tiu artikolo, li emfazis la studadon pri fundamentaj teorioj, kaj la instruistoj tre aprobis liajn opiniojn. Kaj spite al la premo de la reakciaj publikaj opinioj kreitaj de la “kvarpersona bando”, ili iom post iom rekomendis eksperimentadojn en instruado. Laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ pri interligo de teorio kun praktiko, ili faris reordigon al la ĉambroj por eksperimentado. Post la frakaso de la “kvarpersona bando”, la instruistoj liberiĝis el la spirita kateno de ĝia absoluta neado al la atingoj de la eduka afero en la pasinteco. En la somera libertempo de 1977 multaj veteranaj instruistoj ne ripozis, sed partoprenis en laborado por restarigi kaj reformi la eksperimentajn ĉambrojn. Nun ili jam restarigis 11 eksperimentajn ĉambrojn kaj placojn kaj povas plene plenumi eksperimentajn lecionojn laŭ la nova instrua programo.

Iutage, mi pririgardis la eksperimentajn ĉambrojn sub gvidado de fizika instruisto Kiu Ĝengiang. En eksperimenta ĉambro de elektro, troviĝis diversaj instrumentoj necesaj en farado de

fizikaj eksperimentoj pri elektro, inkluzive de instruaj demonstraj paneloj de cirkvitoj divers-specaj. En la pasinteco, la instruistoj ne povis doni profundan impreson al la lernantoj per siaj desegnoj sur nigra tabulo, kaj la uzo de tiaj paneloj povis altigi la efikon de instruado. Post instruado pri elektra lumigado, la lernantoj povas fari ekzercojn en la eksperimenta ĉambro kaj tiel akiri pli bonan scion pri la cirkvitoj, instalado, paralela konekto, seria konekto k.s., kaj akiris praktikan sperton en instalado de elektraj cirkvitoj. En la pasinta semestro, 28 lernantoj de la kvarajara klaso instalas preskaŭ 200 lampojn de 24 klasĉambroj utiligante du dimanĉojn kaj postlecionajn horojn de du posttagmezoj kaj faris nenium eraron. En semestro-meza ekzameno, 90 procentoj de la lernantoj povis ĝuste fari cirkvitajn desegnojn laŭ donitaj kondiĉoj.

Kiam ni eniris la eksperimentan ĉambron de moderna fiziko, lernantoj de la kvinajara klaso estis prenanta lecionon pri optiko. Post klarigo de la instruisto, la lernantoj dividiĝis en grupojn por observi spektron per instrumento sur la podio. La instruisto diris al mi, ke sen proprakula observado de la lernantoj, estas malfacile komprenigi al ili la relative altnivelan enhavon. En tiu ĉambro troviĝis ankaŭ instrua demonstra panelo de radio kaj instrumentoj de atomfiziko kaj lasero por helpi la lernantojn akiri certajn sciojn pri modernaj sciencoj en la mezlernejaj jaroj, instigi ilin al aktivaj studoj kaj apliko de sciencoj kaj havigi al ili fundamenton por grimpi sciencajn altaĵojn en la estonteco.

Iu kemia instruisto diris al mi, ke eksperimentoj ludas gravan rolon en formado de kemiaj konceptoj de la lernantoj. En la eksperimentaj ĉambroj instruistoj kaj lernantoj ankaŭ entreprenas sciencajn esplorojn kaj faras produktadon malgrandskalan, kio ne nur helpas instruadon kaj altigas la nivelon de la instruistoj, sed ankaŭ kontribuas al industria kaj agrikultura produktado. En antaŭurbo de Ŝigiaĝuang troviĝas vasta fruktoĝardeno, kiu bezonas kuprikan sulfaton por mortigi fiinsektojn. Por fari sintezan eksperimenton pri neorganika kemio tra produk-

tado de tiu neorganika kemiaĵo en ligo kun la instruado de neorganika kemio, kiu konsistigas la plejparton de la kemiaj lecionoj mezlernejaj, oni starigis eksperimentejon de kuprika sulfato. La instruistoj kaj lernantoj alportis de kemia fabrika kupran forĵetaĵon kiel materialon, kaj la lernantoj estis dividitaj en grupojn por partopreni, unuj post aliaj, en praktika manipulado. Dank' al apliko de la fundamentaj scioj lernitaj en mezlernejo dum la tuta teknologia proceso de produktado de kuprika sulfato, la lernantoj akiris pli profundan komprenon pri la fundamenta teorio, kaj krome ili ankaŭ akiris unuapasaĵon konon pri oftaj procesoj de kemia produktado kiel bakado, kristaligo, acidizo, lavado kaj maldensigo de sulfacido.

Por pli multe havigi sciojn al la lernantoj, la instruistoj faris multajn klopodojn. Antaŭ du jaroj, ili faris eksperimenton pri petrola kreskigilo, kio multe helpis la lernantojn en studo de fundamenta teorio de organika kemio. Ili ankaŭ faris eksperimenton pri sia produktaĵo en agrikultura produkta brigado kaj dank' al 1-2-foja

Kemia instruisto direktas lernantojn en analizado de grundo.



ŝprucigo de maldensa solvaĵo de petrola kreskigilo al tritiko je la tempo de grajniĝo, la produktokvanto pliiĝis je 10 ĝis 15 procentoj kaj la matura tempo mallongiĝis je 3 ĝis 5 tagoj. Tiu sukceso estis laŭdita de la komunumanoj.

Riĉaj aktivadoj post lecionoj

Kiam mi venis al la Unua Mezlernejo, ĵus komenciĝis la nova semestro de 1978, kaj la grupoj de postlecionaj aktivadoj estis restarigitaj aŭ plivastigitaj. La membroj de tiuj grupoj de fremda lingvo, matematiko, fiziko, biologio, kemio kaj sporto ĉiuj estas elstaraj lernantoj.

Kaj en posttagmezo de iu vendredo mi vizitis la lernejon. Lernantoj partoprenantaj en flugpilka, korbopilka kaj atletaj kaj kampaj ludoj streĉe sin ekzercis sur la sporta placo, sin preparante por partopreni en la Tuturba Printempa Sportkunveno de Mezlernejanoj. En klasĉambroj iris aliaj scenoj: en unu el ili aktivis matematika kurso; en alia iris prelego pri geofiziko, kiun aŭskultis aparte multaj homoj, ĉar tiunokte okazos plena eklipso de la luno.

Kaj tiutage mi estis invitita de biologa kaj kemia instruistoj ĉeesti la celebran aktivadon pro la fondiĝo de iliaj grupoj de postleciona aktivado. Kompreneble mi tuj kaptis tiun ŝancon. Kiam mi atingis la kunvenejon, du lernantinoj estis prezentantaj kemiajn ludojn, kiuj tre interesis la geknabojn rigardantajn: jen, flava slogana tabulo fariĝis ruĝa post surŝprucigo; jen flava paperfloro ruĝiĝis metite en vitra vazo; jen ordinara naztuko trempita en fluidaĵo kaj bakita de alkohollampo ekbrulas, tamen sen difektiĝo; jen iu instruisto ekbruligis kandelon per ektaŭso de metala bastoneto anstataŭ uzo de alumeto. La kemiaj reakcioj vekis grandan intereson al la komencantoj de kemio kaj ili cerbumadis por trovi klarigojn pri la viditaj fenomenoj.

La biologa grupo estis dividita en du partojn: unu okupiĝas pri mikroboj, kaj la alia pri fiziologia sekcado. Mi venis kun la biologa instruisto kaj lernantoj al la mikrobiologia eksperimenta ĉambro, en kiu instaligis kesto de konstantaj temperaturo kaj humideco, sekiga kesto, fridujo k. s. Ak-

tivado komenciĝis. Sub direktado de la instruisto. iuj lernantoj preparis materialon, aliaj faris senbakterian inokuladon de mikroboj kaj triaj esploris evoluadon de hifoj per mikroskopo. La instruisto montris al mi ĉapelfungojn kaj orelfungojn kulturitajn de ili en la lasta semestro kaj diris al mi, ke ili helpis iun produktan brigadon de la antaŭurbo en grandarea kulturado de fungoj, per sia elkulturaĵo. Ili provis kulturati orelfungojn per segaĵo anstataŭ ligno kaj akiris iom da sperto, kaj intencis fari ankoraŭ pli grandskalan eksperimenton pri tio.

La eksperimenta ĉambro de biologia metodo kontraŭ plantaj malsanoj kaj fiinsektoj prezentis al mi eĉ pli interesan kampon. Tie troviĝis bildoj pri insektoj kaj insektoj-specimenoj kolektitaj de instruistoj kaj lernantoj. Instruistoj Juan diris al mi, ke apliko de biologiaj rimedoj kontraŭ plantaj malsanoj kaj fiinsektoj estas aktuala temo de scienca esploro en kaj ekster nia lando, ĝi estas sekvenda direkto en protektado de plantoj. Por havigi sciojn pri tio al la lernantoj, oni fondis la nomitan eksperimentan ĉambron. En la pasinta jaro, ĝi aliĝis al la kunlabora grupo de biologia metodo kontraŭ plantaj malsanoj kaj fiinsektoj de Hebej-provinco kaj akceptis taskon de scienca esplorado. En la lastaj jaroj, ĝi faris ĉefe eksperimentojn pri ekstermado de fiinsektoj per mikroboj, insektoj kaj seksa ekstera insulino, kaj jam atingis certajn sukcesojn.

Mi petis, ke la instruisto iom parolu pri apliko de seksa ekstera insulino en ekstermado de fiinsektoj. Li diris, ke unue oni devas depreni la seksan glandon de lepidopteroj kaj eltrakti inan seksinsulinon, poste fari per akvosorba papero lepidopter-allogilon, per kiu oni povas allogi virajn lepidopterojn kaj ilin mortigi. Ilia tasko de scienca esploro estas esplori la efikecon de seksa ekstera insulino en ekstermo de maizaj kernoboraj vermoj, konservan periodon de tia insulino kaj preparadon de solvaĵo. En la komenco, ili preparis solvaĵon per dikloroetano por fari allogilon, sed la komunumanoj opiniis, ke dikloroetano estas tro multekosta. Ĉu estas eble ĝin anstataŭigi per io alia? Ili faris eksperimentojn per etero, alkoholo, vinagro kaj keroseno kiel solviloj kaj trovis, ke vinagro ne nur efikas simile al dikloroetano, sed ankaŭ estas malrapide vaporiĝanta, longefika kaj plej malmultekosta.

Post kiam ili sukcesis en eksperimento, ili mem faris provan aplikon en kampoj. En tiu somero, ĉiutage la grupo sub gvido de sia instruisto iris al brigado malproksima je kelkaj kilometroj por fari eksperimento. En ĉiu tago ili iris tien dufoje en mateno kaj vespero kaj akiris scienca materialon dum pli ol duona monato, sen interrompo de la lernado en la lernejo. En la kunveno de la brigado por festi la riĉan rikolton en aŭtuno, ilia grupo estis elektita de la komunumanoj kiel avangarda kolektivo. Kaj en sinsekvaj jaroj, tiu grupo estis elektita kiel avangarda unuo de la urbo kaj estis laŭdita de la supera instanco.

(Daŭrigo de p. 26)

tage mi plurfoje iris al la pordo por atendi Ĉefministron Ĝoŭ, tamen li ne venis, kaj tio ripetiĝis en la sekvantaj jaroj. Kompreneble, kiam mi plenkreskiĝis, mi jam sciis, ke Ĉefministro Ĝoŭ estas tre okupata pri ŝtataj aferoj kaj eble ne havas tempon por veni al mia familio, sed mi ja ne atendis ke nia amata Ĉefministro forlasis nin por ĉiam.”

Per tremantaj manoj Ĝoŭ Gujhua prenis el sia librosako la foton de Ĉefministro Ĝoŭ metitan en ruĝan vitritan kadron. Ŝi diris, ke ŝi transdonos ĝin al Vicprezidantino Deng Jingĉaŭ kiel eternan memoraĵon kaj sciigis ŝin, ke ŝi neniam vanigos la kulturadon kaj edukon de Ĉefministro Ĝoŭ al ŝi kaj dediĉos sian tutan vivon al la afero de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado.

GIA MING:

Novaj plantidoj fortikaj

— Pri prezentado de novaj studentoj de la Ĉina Konservatorio

EN frua printempo de la kuranta jaro, la Ĉina Konservatorio okazigis voĉan kaj instrumentan koncerton de novaj studentoj akceptitaj en 1977. Inter ili la plejaĝa estis 22-jara, dum la plej juna 8-jara. Ili havas bonajn muzikajn fundamentojn kaj sentojn, simplan kaj kompletan esprimivon kaj certan teknikon de muziko.

La 8-jara violonisto Lju Siking eklernis violonadon en la aĝo de kvar kaj duon-a jaroj kaj rapide progresis dank' al diligenta ekzercado. Lia relative solida fundamento en tonaj precizeco kaj forteco, lerta arĉado kaj tona kvalito elmontriĝis en lia prezentado de la ĉina komponaĵo "Mi Amas Tian-anmen-pordegon en Pekino" kaj la rumana komponaĵo "Alaŭdo". La 22-jara violonisto Gia Hongguang eklernis violonadon en la aĝo de 6 jaroj, ĉefe dank' al sia diligenta memlernado kaj helpo de instruistoj en postlaboraj horoj. Lia ludado de "Violona Konĉerto en D Majora" de la germana klasika muzikisto Johannes Brahms montris kompletecon kaj maturecon de lia arto.

Inter la pianistoj la plej juna estis la 10-jara Caj Jimin. Per siaj prezentado de "Etudo en F



Lju Siking

Minora" de Ŝopeno fluanta kvazaŭ fonto lirika kaj ludado de lia "Etudo en G Bemola Majora" plena je entuziasmo, naiveco kaj brileco, ŝi profunde impresis la aŭskultantojn. La 15-jara mjaŭ-nacieca pianisto Ĝou King kreskis ĉefe en ekzercado dum postlecionaj horoj en infana kulturdomo. Lia ludado de la ĉina komponaĵo "Liberiĝo" kun vigla gajeco relative bone spegulis la feliĉon kaj emocion de la nord-Ŝenhi-a popolo post sia liberiĝo sub la gvido de la Kompartio kaj Prezidanto Maŭ. Kiam li prezentis la rondelon "Senĉesa Moviĝo" de la germana muzikisto Weber, lia ludado estis rapida kvazaŭ ventego kun granda imponeco dank' al tre bona kunago de ambaŭ manoj.

Estis pli granda nombro da talentuloj en ludado de naciaj muzikaj instrumentoj. La 12-jara zimbalonistino Liu Juening, la 14-jara bivisto Vu Man, la 13-jara *erhu*-istoj Hju Pingli kaj Jan Hong, ĉiuj estas lernantoj eminentaj en moralo, inteligenteco kaj korpo. La du lastaj ŝatis ludi *erhu*-on en postlecionaj horoj kaj iliaj ludoj estis tre bonaj kaj havis siajn apartajn karakterizaĵojn. Jan Hong montris sian eminentecon ĉu

en arĉado kaj fingromovo, ĉu en precizeco kaj forteco de la tonoj, kiam ŝi ludis la komponaĵojn “Akvo de Rivero” kaj “Ĉevala Konkurso”. Aparte mirinda estis ŝia kolorriĉa muzika esprimo.

Kantistino Ĉeng Gujhan veninta de la paŝtejo de la Interna Mongolio kapablas kanti en la mongola kaj hana lingvoj. Ŝia bela kaj brila kanto kun intensa stepa karakterizaĵo estis intima kaj kortuŝa. Kiel membro de literatura kaj arta propaganda taĉmento — Ulanmuĉi, ŝi trairis la stepon kaj la kamparon de la hejmloko. Ŝi estis laŭdita de la spektantoj pro ŝiaj bela voĉo, multaj kantmanieroj kaj intensa nacieca koloro.

Rigardante tiujn talentajn gejunulojn, la rektoro de la Konservatorio Ĝaŭ Feng diris ĝoje: “Neniam en la 30 jaroj post la fondiĝo de la Konservatorio ni havis kandidatojn tiel multajn kaj same altkvalitajn kiel en la pasinta jaro.” Al pli ol dek naciecoj apartenis la pli ol 17,000 kandidatoj, inter kiuj estis laboristoj, kamparanoj, lernantoj, literaturaj kaj artaj laborantoj, intelektaj gejunuloj irintaj al kamparo kaj malmobilizitaj armeanoj. Multaj kandidatoj-violonistoj elektis por sia ekzamena ludo relative mal-




Vu Man

Caj Jimin



facilajn komponaĵojn, inter kiuj estas violona konĉerto de Betoveno, violona konĉerto de Mozart kaj ŝakono de Bach, kaj ankaŭ verkoj de Paganini, Mendelssohn kaj Sibelius.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949, la muzika eduko multe progresis kaj multe superis tiun en la malnova Ĉinio. Sed en la pasintaj kelkaj jaroj la “kvarpersona bando” tenis en siaj manoj la gvidantecon de literaturo kaj arto, disigis muzikedukajn instituciojn, malordigis la efikajn edukan sistemon kaj instruajn materialojn, nuligis la ekzamenan sistemon al kandidatoj kaj starigis sian edukan “sistemon”. Post frakaso de la “kvarpersona bando”, oni faris ordigon kaj reformon kaj restarigis la ekzamenan sistemon al kandidatoj. La vicrektoro de la Konservatorio Prof-ino Ju Jihjuan diris: “Akcepti la plej bonajn kandidatojn tra ekzamenado de altaj lernejoj estas grava paŝo por ĝusta plenumo de la



Liu Juening

eduka penso de Prezidanto Maŭ Zedong. Prezidanto Maŭ emfazis reformon al ekzamenado, tamen neniam oponis kontraŭ necesaj ekzamenoj. Kun kaŝita intenco la 'kvarpersona bando' distordis instrukciojn de Prezidanto Maŭ kaj nuligis la ekzamenan sistemon, kio serioze atencis la varbadon de kandidatoj kaj multe malaltigis la edukan kvaliton. La instruistoj maltrankviliĝis pro manko de daŭrigantoj de la revolucia afero." Multaj instruistoj vidis brilan perspektivon, kiam aperis antaŭ ili tiel multaj talentaj gejunuloj inter la kandidatoj. Kaj la instruistoj, kiuj partoprenis en la varbado de kandidatoj, sentis ĝojon pro sia grava tasko.

Por trovi kiel eble plej multajn talentulojn, oni faris ĉiamanieran klopodon. Cirkulas en Kantono jena epizodo de ekzamenado.

Geng-o estas ĉina antikva pluka muzikilo. Inter la ekzamenataj *geng*-istoj troviĝis iu 14-jara knabino. Ŝi ludis novan komponaĵon pri kiu ŝi sin ekzercis nelonge, sed ne antikvajn

komponaĵojn kiujn ŝi scipovis lerte ludi, kaj ŝi malsukcesis. Multaj diris al la ĉefa ekzamenanto, ke tiu kandidatino estas lerta en ludado de tradiciaj komponaĵoj de *ĝeng-o* kaj ricevis multajn aplaŭdojn ĉe la amaso. La ĉefa ekzamenanto decidis lasi ŝin ludi ankoraŭfoje. Sed tiam jam batis la sesa horo posttagmeze, kaj neniu sciis kie estas la kandidatino. Sed oni trovis ŝin dank' al helpo de amaso. Ŝia ludado de antikva komponaĵo kun elstara karakterizaĵo de popola muziko estis tre kortuŝa. La ekzamenantoj multigis de du ĝis ses, kaj ĉiuj laŭdis ŝin pro ŝia lerta ludado. Kiam la ekzameno finiĝis, estis jam la 12-a horo meznokte, la instruistoj tamen sentis nenian laciĝon.

La kandidatino, nomata Lin Ling, refoje ludis, en la koncerto, la tradician komponaĵon "Ruĝa Lotusfloro" kaj ricevis varman aplaŭdon de la spektantoj. Multaj diris ke en la koncerto ili vidis la brilan futuron de la ĉina muzikarto kaj la esperon de prosperiĝo.

Neforgeseblaĵo

SUR muro de la centra ĉambro de la hejmo de komunumano ĉe la piedo de Luŝan-monto de Gianghi-provinco, pendas foto de Ĉefministro Ĝoŭ kun knabineto ĉe lia flanko.

En aŭtuno de 1961, akompanante Prezidanton Maŭ, Ĉefministro Ĝoŭ suriris Luŝan por ĉeesti laboran kunvenon kunvokitan de la Centra Komitato de la Partio. Post tiu kunveno, Ĉefministro Ĝoŭ farigis la memorindan foton en Guanĵinkiaŭ ĉe la piedo de Luŝan sur vojo de inspektado al Gianghi-provinco. La knabineto sur ĝi nomiĝas Ĝoŭ Guĵhua, kiu nun estas vicestrino pri virina laboro de Juging-brigado de Vuli-komunumo de Hingzi-gubernio kaj reprezentanto de la Kvina Tutlanda Popola Kongreso.

Tiam Ĝoŭ Guĵhua estis nur 13-jara knabineto paŝtanta bovon, kun du harligaĵoj kaj nudaj piedoj. Forpasis 16 jaroj. Ŝi estas sane kreskanta sur la larĝa socialisma vojo montrita de Prezidanto Maŭ.

Dum sia ĉeestado al la Kvina Tutlanda Popola Kongreso, kun profunda amo al Ĉefministro Ĝoŭ, Ĝoŭ Guĵhua rakontis al mi pri liaj kora zorgo kaj eduko al ŝia familio. Ŝi diris: "Antaŭtagmeze en septembro de 1961, apenaŭ mi kaj mia patrino finmuĝis rizon, kiam mi vidis ke kelkaj aŭtomobiloj haltis antaŭ la pordo de nia domo. Mi kuris al ĝi kaj vidis ke el ili iris altaj gvidantoj. Mi ektimetis kaj volis kuri hejmen. Sed ne atendite iu afable vokis min: 'Knabineto, ĉu vi povas gvidi nin al Guanĵinkiaŭ?'. Mi pensis, ke tiu loko troviĝas nur je iom pli ol 500 metroj fore kaj la vojon mi bone konas, do mi kuraĝigis min kaj diris: 'Jes'. Tiam iu gvidanto paŝis al mi kun rideto kaj prenis mian kotplenan maneton per sia varma manego kaj diris, ke mi gvidu ilin iri al Guanĵinkiaŭ. Survoje alia gvidanto diris al mi: 'Knabineto, ĉu vi konas lin? Li ja



estas Ĉefministro Ĝoŭ.’ Informiĝinte ke li estas Ĉefministro Ĝoŭ kiu gvidis la ĉinan popolon en revoluciado kune kun Prezidanto Maŭ, mi tiel ĝojiĝis ke forte saltadis mia koro. Tiam mi mallevis la kapon, rigardis miajn manojn kaj piedojn kaj sentis iom da ĝeneco. Ĉu decas, ke mi iru kune kun Ĉefministro Ĝoŭ en tia aspekto? Mi levis la kapon kaj ĵetis rigardon al li, kaj li sin klinis al mi kun rideto kaj demandis al mi kun amemo: ‘Knabineto, kio estas via nomo? Kian aĝon vi havas?’ Mi diris, ke mi nomiĝas Gujhua kaj estas dektrijara. Li demandis min, ĉu mi vizitas lernejon kaj kion mi faras hejme? Mi diris al li, ke mi vizitis lernejon du jarojn kaj nun paŝtas. Ĉefministro Ĝoŭ detale demandis, ĉu bovon aŭ bubalon mi paŝtas. Kaj li diris al mi, se bubalon mi paŝtas, do mi povas rajdi sur ĝi. Lia rimarkigo ridigis min, kaj ankaŭ li ekridis laŭte kaj serene. Dum ripozado en Guanĵinkiaŭ, Ĉefministro Ĝoŭ lasis foti lin kune kun mi. Tiam mi sentis ke Ĉefministro Ĝoŭ estas plej kara, mi min premis en lian sinon kaj miaj okuloj pleniĝis je larmoj.”


“Sur la revena vojo de Guangĵinkiaŭ,” daŭrigis Ĝoŭ Gujhua, “mi babiladis kaj ridadis. Subite la Ĉefministro demandis min: ‘Malgranda Gujhua, ĉu la popolanoj de via loko manĝas dufoje rizaĵon kaj unufoje kaĉon ĉiutage?’ Mi mallevis la kapon kaj ne respondis. Ĉefministro Ĝoŭ denove demandis: ‘Dufoje kaĉon kaj unufoje rizaĵon, ĉu ne?’ Mi ekridis al li. Kiam ni venis al la pordo de mia hejmo, Ĉefministro Ĝoŭ nepre volis eniri. Miaj gepatroj kaj onklo ĝuste estis en la hejmo. Enirinte la pordon, Ĉefministro Ĝoŭ, jam sciinta ke ankaŭ mia familia nomo estas Ĝoŭ, diris humure: ‘Jen mi hejmen revenas.’ Informiĝinte ke li estas Ĉefministro Ĝoŭ, ĉiuj miaj familianoj tre ĝojis kaj tuj cedis al li sidlokon, kaj mia patro donis al li pelvon da malvarma teo. Ĉefministro Ĝoŭ, same kiel ni terkulturistoj, sidiĝis sur la benko kaj trinkante babilis kun mia patro pri la vivo kaj la stato de la kamparo. Li tre zorgis pri la problemo de vestaĵoj, manĝaĵoj kaj loĝado de popolamasoj. Parolante pri greno, li demandis, ĉu nia familio havas sufiĉe da greno? Mia patro ne kuraĝis respondi al li. Tiam Ĉefministro Ĝoŭ diris:

‘Nun ni estas en malfacila periodo, mi scias la staton eĉ sen via diro. Ne timu.’ La patro estas honesta, do diris al li la efektivan staton: ‘Mi diru la veron, ne tre sufiĉe, nur duonkilogramon da rizo por ĉiu laborulo ĉiutage, kiom mi povus formanĝi unufoje.’ Finaŭskultinte lian vorton la Ĉefministro lin laŭdis: ‘Estas prave, ke vi diris la veron.’ Poste li ekstaris kaj diris kun firmeco kaj forteco: ‘Nia lando suferis gravan naturan katastrofon, kaj krome oni premeĝas nian kolon por nin sufoki. Nun ni havas multajn malfacilojn. Tamen, nur se ni persistas en la revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj luktaĵos nin apogante sur la propraj fortoj, nia vivo certe pliboniĝos. Vi devas energie labori por multe produkti grenon, multe bredi porkojn kaj kokojn, kaj venki la malfacilojn per kolektiva forto.’ Miaj familianoj tuj certigis lin, ke ni nepre trapasos la malfacilan periodon kaj bone konstruos nian hejmlokon laŭ lia instrukcio. Kiam Ĉefministro Ĝoŭ volis foriri, ni petis ke li manĝu ĉe ni. Li svingis sian manon kaj diris kun rideto: ‘Hodiaŭ ne. Kiam riĉiĝos via familio kaj festenos kun porkaĵo kaj kokaĵo je Novjara Festo, mi venos por gastigi ĉe vi.’ Ni bedaŭre akompanis Ĉefministron Ĝoŭ sur la ŝoseon, kaj tiam li ankoraŭ sin turnis al ni kaj diris refoje: ‘Kiam vi vivos en abundeco, mi certe venos por gastigi ĉe vi.’”

Ĝoŭ Gujhua diris: “Ekde la tago, en kiu Ĉefministro Ĝoŭ venis al nia hejmloko, mi kaj miaj patro kaj onklo transdiris liajn instrukciojn al ĉiuj popolanoj de la tuta vilaĝo. Tio donis al ili grandan kuraĝigon. Ni ĉiuj laboris energie por disvolvi la produktadon kaj nia vivo multe boniĝis en la sekvanta jaro. De tiam niaj produktado kaj vivo ĉiam pli boniĝis jaron post jaro. Precipe post la Granda Proleta Kultura Revolucio leviĝis alta tajdo de lerno de Daĝaj en agrikulturo, profunde ŝanĝiĝis la fizionomio de nia loko, kaj la grenplantoj de la brigado estas ne plu atenceblaj de sekeco aŭ inundo. Havante riĉikoltojn, mi sopiris revidi la estimatan kaj amatan Ĉefministron Ĝoŭ. Okaze de la Printempa Festo en la sekvanta jaro post lia vizito al nia hejmloko, mia familio buĉis porkon, kaj ĉiu-

(Daŭrigo sur p. 21)

La Ferĉena Ponto
super Dadu-ri-
vero, venke tra-
pasita de la Ruĝa
Armeo en la
Longa Marŝo



Pejzaĝo de Dadu-rivero

Dadu-rivero fontas el la montaro Guoluo ĉe la limo inter la provincoj Siĉuan kaj Kinghaj. Ĝi longas je 1,155 kilometroj kaj estas la plej granda branĉo de Mingiang-rivero. Ĝia supra baseno kun multaj branĉetoj kaj larĝa kaj malprofunda riverlito serpentas ĉe la sudorienta rando de la Kinghaj-Tibeta Altebenajo. Dekstre de la meza baseno estas la Granda Neĝmonto kaj maldekstre la gigantaj montoj Giagin, Erlang kaj Dahiangling. La riverlito de ĝia malsupra baseno estas larĝa, ambaŭborde estas ŝtuparaj kampoj kaj malgrandaj ebenajoj. Mirinde belaj estas la pejzaĝoj en ĝia baseno.

En la baseno konserviĝas riĉaj fontoj de mineraloj kaj akvoenergio kaj kreskas densaj praarbaroj. Post la Liberiĝo, oni komencis ekspluati ĝin kaj tie aperis tute nova fizionomio.



Gongga-monto, la ĉefa pinto de la Grandá Neĝ-monto altas je 7.556 metroj super la mara nivelo.




Stuparaj kampoj en la baseno de Dadu-rivero



La Siĉuan-Tibeta Soseo trans Dadu-rivero estas arterio kunliganta sudokcidentan regionon de nia lando kun Tibeto. La bildo montras Erlang-montan pejzaĝon.


Gongzuj - hidroelektrejo konstruita en mal-supra baseno de la rivero estas nun la plej granda hidroelektrejo en sudokcidenta regiono de nia lando.





Riĉa rikolto de mandarinoj

En Leŝan situanta ĉe la kunfluejo de Dadu-rivero kaj Mingiang-rivero troviĝas rara grandega ŝtona statuo de budho ĉizita en 90 jaroj en Tang-dinastio. Ĝi altas 71 metrojn. Ĉirkaŭ ĝi sin trovas ankaŭ miloj da ŝtonaj statuoj.



Ŝati sciencojn de infanaĝo

ESTIS dimanĉo. Mi venis al la Pekina Geknaba Palaco por pririgardi sciencajn aktivadojn de geknaboj.

40 fojoj de provflugo

Aro da geknaboj de la grupo de aviadilaj modeloj prove flugigis diversajn aviadilajn modelojn. La malgrandaj arĝentaj aviadiloj flugis jen en la bluan ĉielon, jen ekvilibre rondirojn. Vidinte ke la aviadiloj propramane faritaj de ili flugas en la blua ĉielo, la geknaboj ĝoje kriis: "Brave, brave!"

Mi iris al du knaboj kaj komencis interparoli kun ili. Unu el ili estis Liu Hiang-hong, lernanto de la dua klaso en la 81-a Mezlernejo de Pekino, la alia estis Liu Gang, lernanto de la tria klaso de elementa lernejo. Ili havas fortan inklinon al farado de aviadilaj modeloj kaj lernas tre bone en siaj lernejoj. Sukcese trapasinte eniran ekzamenon ili aniĝis al la grupo de scienco kaj tekniko. Post unujara lernado ili jam akiris sciojn pri la strukturo kaj funkcio de aviadilo kaj komprenas kial ĝi povas flugi, kaj

kiel ĝi ekflugas. Ili ankaŭ jam povas mem fari diversajn aviadilajn modelojn kaj ilin flugigi al la ĉielo.

"Ĉu en la komenco la aviadiloj faritaj de vi jam povis flugi ĉielen?" Ili ekridis pro mia senscieco.

Liu Gang diris kapskuante: "Ne facile estas flugigi aviadilon en la ĉielon. Komence mi eĉ

Membroj de la grupo de aviadilaj modeloj





Membroj de la botanika grupo faras eksperimenton kun helpo de instruisto.

timis bruon de ĝia motoro kaj kovris miajn orelojn per la manoj. Lernogvidanto Giang Kinian kuraĝigis min, ke mi ne timu; unuflanke li klarigis al mi teorion pri aviadilo kaj aliflanke instruis min funkciigi motoron. Tra ripetada praktiko mi lertiĝis iom post iom.” Poste ili ambaŭ rakontis al mi kiel ili faris la unuan provflugadon.

Sub pacienca direktado de la lernogvidanto, ili finfaris sian unuan tiratan aviadilan modelon kaj ĝoje partoprenis en provflugado. Kun bruo de motoro, la aviadila modelo ekflugis, sed atinginte la altecon de tegmento ĝi abrupte falis. Liu Hianghong kaj Liu Gang ĉagrene prenis la difektitan aviadilon. Por rapide elfari ĝin, frumatene de dimanĉo ili venis al la Geknaba Palaco por fari desegnaĵon, ili ne ripozis eĉ post la lernohoroj kaj en la lastaj tagoj ili plene sin dediĉis al farado de la aviadilo, sed ĝi. . .

La lernogvidanto ilin konsolis, dirante: “Sciencistoj ne povas esti deprimitaj eĉ de centoj

kaj miloj da malsukcesoj en eksperimentado. Prave diras la proverbo ‘Malsukceso estas la patrino de sukceso’. Ni devas havi memfidon.”

Liu Hianghong kaj Liu Gang decidis lerni de sciencistoj de la malnova generacio kaj nepre volis fari bonan aviadilon eĉ post cent malsukcesoj.

Sub direktado de la lernogvidanto, ili atente serĉis la kaŭzon de la malsukceso kaj trovis, ke eraraj estas la angulo de la padeloj kaj la parto, kiu stabiligas la aviadilon. Kvankam la aviadila modelo estas tre malgranda, tamen ĝi estas kompleta tutaĵo kaj neniu parto de ĝi estas neglektebla. Dum ĉiu korekto kaj reguligo ili akiris novajn sciojn. Multaj malsukcesoj fortigis ilian persistemon en batalo kontraŭ malfaciloj. En unu monato ili faris 40 provflugojn. Nun la aviadila modelo kreita de ili per multa klopodo jam flugis en la bluan ĉielon.

Kolektado de drogherboj surmonte

Aŭtune, aŭtomobilo kun grupo de geknaboj haltis ĉe la piedo de monto en antaŭurbo de Pekino. La knaboj elaŭtiĝis kaj iris surmonten kunportante kolektan keston, paperujon por drogherbaj specimenoj, pioĉojn kaj malgrandajn ŝpatojn.

“Hirund-herbo!” ekkriis iu knabo alte tenante kelkajn herbojn kun maldika longa trunko kaj samtempe elprenis el la librosako karton kaj zorge skribis sur ĝi: “Specio de ranunkolacoj por kvietigi febron.”

En densa herbaro, Ĝang Juĝen kaj kelkaj kunlernantoj serioze esploris iun herbon konsultante dikan libron. Laŭ tiu libro la sonorilfloro (Platycodon grandiflorus) ricevis sian nomon

pro tio, ke ĝiaj floroj similas al sonoriletoj. Ili diris: "La trovita herbo certe estas sonorifloro kiu povas kuraci malvarmumon." Tiuj lernantoj estis baldaŭ diplomotaj el la supera mezlernejo kaj decidis pli multe lerni por pli bone servi al la popolo.

Tiuj kolektantoj de drogherboj estas membroj de botanika grupo de la Pekina Geknaba Palaco. Ilia gvidanto Liu Jongŝeng prezentis al mi tiun grupon.

Ĝi havas 60 lernantojn, kiuj estas plejparte bonaj lernantoj ŝatantaj botanikon el diversaj lernejoj. Ili unuflanke lernas botanikan klasifikon kaj aliflanke kolektas vegetaĵajn specimenojn. Nun ili jam vizitis ĉiujn grandajn parkojn de Pekino. En la pasinta unu jaro, la lernantoj de la botanika grupo jam kolektis centojn da vegetaĵaj specimenoj kaj povas distingi pli ol 100 sovaĝajn vegetaĵojn.

Ĉijare en Gingsan-parko, kiu situas apud la Palaco, ili faras botanikan enketon kaj klasifikon al ĝiaj arboj, herboj kaj florplantoj, esploras ilian utiligeblecon kaj kompilos albumon "Vegetaĵoj de Gingsan-parko". Dank' al tio la lernantoj ricevis multajn sciojn de praktiko.

Lertuloj

La pluretaĝa scienca domo similas al malgranda fabriko. Troviĝas en ĝi telegrafoj, radioriceviloj kaj aliaj instrumentoj. Mi vidis tie, ke lernantoj de la radia grupo absorbite mezuras radiaparatajn elementojn, muntas transistorajn radioricevilojn, reguligas radiotelefonon. . . Gvidanto de la grupo Hju Ajping diris al mi, ke la grupo jam havas aĝon de 5 jaroj. Por kulturi intereson de geknaboj pri scienco, la Geknaba Palaco disponigas al la geknaboj multajn radiajn instrumentojn kaj ofte invitas profesorojn, sciencajn kaj teknikajn laborantojn de la Universitato Kinghua kaj aliaj sciencaj institucioj por fari al lernantoj lekciojn pri fundamentaj scioj de radio. Poste li rakontis al mi pri Caŭ Guoking, lernanto de la 33-a Mezlernejo de Pekino.

Caŭ Guoking ne nur ŝatas lerni sciojn pri elektro, sed ankaŭ akiris lertecon en muntado

kaj riparado de radioriceviloj. Li povas malmunti, kontroli kaj denove munti instruan radioricevilon en pli ol du horoj sen pririgardo de cirkvita desegno. Aŭdinte tion, mi speciale atentis la manipuladon de Caŭ Guoking. La elektra lutilo en lia mano senĉese moviĝis, dekoj da grandaj kaj malgrandaj elementoj rapide kaj ĝuste fiksiĝis sur la cirkvita plako kaj norma radioricevilo naskiĝis en tre mallonga tempo. Instruisto Hju diris: "Li estas fervora en servado al la aliaj." Antaŭ kelkaj tagoj, kiam li vizitis instruiston Vang Juansau, li informiĝis ke la transistora radioricevilo de la instruisto difektiĝis, kio tre ĝenis la instruiston. Caŭ Guoking sidiĝis por malmunti kaj kontroli la aparaton. Kvankam la instruisto sciis ke li lernis pri radio en la Geknaba Palaco, tamen malfidis lin pro tio ke li estas tro juna. Caŭ Guoking rimarkis lian maltrankvilon kaj diris kun rideto: "Instruisto, mi provu!" Li malfermis la radioricevilon, rapide trovis la difektiĝon, ĝin riparis kaj jen la radioricevilo ekkantis. Instruisto Vang diris ĝoje frapante lian ŝultron: "Mi ja ne atendis, ke vi estas tiel lerta en tio!"

Naskiĝo de la unua televidilo

En la ĉambro de la televidila grupo estis nova 9-cola televidilo, kun la gravuritaj vortoj "Pekina Geknaba Palaco". Tio estas la unua televidilo farita de lernantoj de tiu grupo por gratuli la kunvokiĝon de la Tutlanda Scienca Konferenco.

Proksimiĝinte al la televidilo mi atente ĝin pririgardis kaj trovis ke ĝi tute similas al tiuj vendataj en magazenoj laŭ aspekto kaj strukturo. Se la gvidanto ne prezentus ĝin al mi, mi ne povus imagi al mi, ke ĝi estis farita de geknaboj. Vidinte la cirkvitan plakon kun diverskoloraj dratoj kaj ĉ. mil lutpunktoj, mi pensis kun admiro: En plenumo de tia preciza laboro eĉ erareto povas kaŭzi malsukceson! Lernanto Ĝang Ĝengang diris al mi: "Kiom da malfaciloj oni devis venki por fari la televidilon kun laŭta sono kaj klara bildo, kies cirkvito estas kompleksa, kies muntado postulis rigoran teknikon kaj kies elementoj plejparte estas nenormaj produktaĵoj kun malalta kvalito fordonitaj de fabrikoj!"

Modela vendisto

Ĝang Bingguj



Ĝang Bingguj en servado

LA Pekina Magazeno sidas en Vangfugingstrato, la plej vigla komerca centro de la ĉefurbo. Kiam oni venas al vendostablo de bombonoj de la magazeno, oni povas vidi tie maljunan vendiston kun insigno "Labora Modelo" sur la brusto. Oni ĵetas al li admiran rigardon, vidante lian varman kaj lertan servadon. Li estas fame konata labora modelo de la pekina komerca fronto Ĝang Bingguj.

60-jara Ĝang Bingguj sin okupas pri vendado jam pli ol 40 jarojn. Antaŭ la Liberiĝo, li servis en vendejo de malvarmaj trinkaĵoj de iu kapitalisto kaj multe suferis ekspluaton kaj ofendon. Post la Liberiĝo, li fariĝis popola vendisto. Tamen tiam li ne klare sciis kiel bone fari sian laboron en la nova socio. Li opiniis, ke multe vendi varojn por la magazeno signifas bonan plenumon de la laboro. Foje iu kliento volis aĉeti du kukojn, tamen Ĝang Bingguj, lasante lin longe atendi, fervore akceptis multaĉetantojn. La unua kritikis lin, dirante: "Ĉu vi neglektas min pro tio ke mi aĉetis malmulte?" Informiĝinte pri tio, gvidantoj de la magazeno faris al li pacienca edukon kaj komprenigis al li ke vendo havas tute malsaman signifon en la nova kaj malnova socioj, kaj ke la malnova komerca

stilo havis sur lin malbonan influon. Antaŭ la Liberiĝo, inter klientoj kaj vendistoj ekzistis nur rilato de mono, tamen en la nova socio la laboro de vendistoj estas servo al la popolo. La socialisma komerco estas servanta al disvolvo de socialisma ekonomio kaj plibonigo de la popola vivo.

Alia afero multe kortuŝis Ĝang Bingguj. Foje, malsana klientino alvenis por aĉeti kukojn, tamen ŝi ne sciis, kian specon ŝi devas elekti. Ĝang do detale prezentis al ŝi gustojn de ĉiuj specoj de kukoj kaj sub lia helpo ŝi elektis specon plej plaĉan al si. La klientino laŭdis lin pro lia fervora servo. Kaj post kelkaj tagoj, ŝi revenis kaj donacis al li saketon da fruktoj produktitaj de sia hejmloko por esprimi sian dankon. Nokte, Ĝang Bingguj neniel povis endormiĝi, turniĝante sur la lito, kaj refoje memoris la okazintaĵon en 1947: Venis kuomintanga soldato por manĝi glaciaĵon. Pro iom da atendo, li ekkoleriĝis kaj forte pugnis lin en la bruston, senĉese insultante. Li neniel povis plendi pri la maljustaĵo kaj ankoraŭ devis peti de tiu pardonon kun ŝajnigita rideto. Hodiaŭ, li faris iom da laboro al klientino, kaj la lasta jam prenis lin kiel intimulon. Li pensis en si, ke li ne havas rajton ne bone

servi al la popolo. De tiam Ĝang servas al klientoj ĉiam kun varma koro.

Foje, virino kun infano en la brako venis por aĉeti bombonojn. Ankoraŭ ne estis ŝia vico, tamen la infano jam perdis paciencon kaj senĉese urĝis sian patrinon. Ĝang Bingguj prenis el la varobreto bombonon kaj metis ĝin en la manon de la infano, kaj tiu tuj kvietigis. Ĝang diris al la patrino: "La koston de tiu bombono mi kalkulos iom poste." Kun dankemo la klientino kapjesis. Kiam venis ŝia vico por aĉeto, Ĝang elprenis unu el la pesitaj bombonoj kaj metis ĝin en la breton, kaj poŝigis ankoraŭ kelkajn aparte pakitajn al la infano, dirante: "Tiu estas por survoja manĝado de la infano." Poste li solide pakis la restajn bombonojn kaj donis al la klientino. Kortuŝite, la klientino diris al la infano: "Danku Avon!" Kaj la lasta naive kriis: "Avo!" La aliaj klientoj ekridis kaj laŭdis Ĝang Bingguj, ke li zorgis la infanon pli perfekte ol la patrino.

Ĝang Bingguj povas tutkore servi al la popolo ĝuste pro tio, ke li havas profundan proletan amon al la klientoj. Foje iu ĈPLA-ano venis aĉeti bombonojn. Por ne ĝeni la tro okupatan Ĝang, li postulis ke Ĝang ne paku, sed rekte ŝutu la aĉetitajn bombonojn en lian malfermitan vojaĝsakon. Laŭ lia dialekto, Ĝang sciis, ke li devenas de la tre varma Siĉuan. Timante, ke la bombonoj degelos de varmo en la sako, li insistis pri pakado, kaj aldonis vaksitan paperon al la interno de la pako kaj solide ĝin pakis. Alifoje, kliento volis aĉeti 0.1 juanon da bombonoj. Kvankam la monsumo estis malgranda, tamen Ĝang volis ke tiu iom multe gustumu kaj vendis al li kvar specojn da malmultkostaj bombonoj, kio multe kontentigis la klienton.

Kun disvolviĝo de la socialisma konstruado, la varspecoj de la magazeno ĉiam plimultiĝas. Por doni bonan konsilon al klientoj, Ĝang Bingguj elspezis multan tempon por koni varojn de sia vendostablo. En ferioj li iris al bombonfarejo por koni ties produktadon. Post labordeĵoroj, li iris al hospitalo por lerni de kuracistoj sciojn pri nutro de bombonoj. En la lastaj jaroj li aĉetis, per sia propra mono, pli ol 200 specojn de bombonoj por gustumi. Dank' al tio riĉiĝis liaj scioj pri bombonoj kaj estas pli bone plenu-

mita lia laboro. Ekzemple, al kliento suferanta hepatiton li rekomendis specojn de bombonoj taŭgajn por kuracado de la malsano, al bronkito-suferanto kristalan sukeron, al dispepsio-suferanto citronan aŭ mandarinan bombonon, ktp.

Foje, iu kliento postulis kvar specojn da bombonoj. Ĝang rapide paŝis al la breto kaj ĝuste pesis mane la postulitajn bombonojn. Dum la pakado li jam pense elkalkulis la totalan koston de la aĉetitaĵo. Ĉio ĉi tio estis plenumita nur en 47 sekundoj. Oni laŭdis lin pro la lerta servado kaj precipe pro la diligenta lertigado de la serva kapablo.

Por sin ekzerci en ĝusta mana pesado, li pesis dekojn da specoj de bombonoj po 50 gramoj kaj ripetade ekzercis sian manprenadon. Dank' al praktikado de pluraj jaroj, la ĝusteco de lia manpesado jam superis 50%. Krome, li estas lernema pri alies nova sperto. Foje, li rimarkis, ke iu juna vendisto uzas novan pakmanieron. Li do modeste konsultis lin kaj rapide ellernis la teknikon. Dank' al tio la tempo por pakado de bombonoj mallongiĝis je du trionoj kompare kun tiu pasinta.

Antaŭ nelonge, Ĝang Bingguj ĉeestis la Kvinan Tutlandan Popolan Kongreson kaj estis elektita kiel membro de la Konstanta Komitato de KTPK, la plej alta organo de povo de la ŝtato. Li decidis pli bone servi al la popolo en estonto.

Ĝang Bingguj (la kvara de dekstre) interparolas kun aliaj reprezentantoj de la komerca fronto.





Hju Kingven (dekstre) kun aliaj kadroj de la brigado

Demokratio en produkta brigado

de GIN JANG

EN varmaj manklakadoj naskiĝis nova komitato de produkta taĉmento. Ĉe tio la elektita taĉmentestro stariĝis, dankis la komunumanojn pro ilia konfido al li kaj esprimis, ke li bone plenumos sian funkcion en la nova jaro por akiri grandan riĉrikolton de agrikultura produktado.

Tio okazis en la unua produkta taĉmento de Nanhangi-brigado en Fangŝan-gubernio sudokcidente de Pekino ĉe la fino de 1977. Vicsekretario de la brigada partia filio diris al mi, ke sub la brigado estas tri produktaj taĉmentoj, kaj ĉiu el ili havas sian komitaton konsistigitan el sep membroj inkluzive de taĉmentestro, viciaĉmentestroj kaj aliaj. Por elektado de kadroj la unua taĉmento jam okazigis tri kunvenojn. En la unua kunveno pri resumo de la pasintaj laboroj komu-

numanoj faris multajn kritikojn al la taĉmentestro. Iuj diris, ke li ne aŭdis alies opiniojn, kaj pro tio malfruigis ĝustatempan plenumon de iuj produktaj taskoj. Aliaj diris, ke li montris venĝemon kontraŭ kritikintoj kaj maljuste traktis ilin, ktp. En la dua kunveno la taĉmentestro faris memkritikon sed neprofundan, tial la amasoj malkontentiĝis pri tio kaj ne aprobis lin kiel kandidaton de la nova komitato. Post detala enketado la partia filio konfirmis la opiniojn de la amasoj kaj konsentis la kandidatojn elmetitajn de la komunumanoj. En la tria kunveno estis elektita la nova komitato de la taĉmento.

Tiu demokratia stilo de Nanhangi-brigado estis persiste praktikata de la partia sekretario Hju Kingven. Hju Kingven nun estas 56-jara. Li

aliĝis al la Okavoja Armeo en 1938 kaj revenis al la hejma loko post malmobiliziĝo en 1954. Tiam vigle disvolviĝis la movado de agrikultura kooperigo, kaj malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj en lia hejmloko fondis agrikulturan kooperativon. Li diris ĝoje: "Tio estas la ora vojo montrita de Prezidanto Maŭ, ni nepre devas bone funkciigi la kooperativon!" Li donacis al la kooperativo sian subvencion de malmobilizo por solvi ĝiajn malfacilojn.

Hju Kingven portis la demokratian stilon de ĈPLA al sia hejmloko. Nelonge post kiam li fariĝis sekretario de la partia filio, iu veterana kamparano diris al li: "Kingven, sterko ludas gravan rolon en agrikultura pliproduktado!" Li do starigis en la brigado sterkokolektan grupon kaj samtempe instigis la kooperativanojn bredi porkojn por plimultigi sterkon. Dank' al tio la kulturataj plantoj de Nanhangi-brigado kreskas ĉiam pli bone. Por pli multe kolekti opiniojn de veteranaj kamparanoj, Hju Kingven prenas iujn el ili kiel siajn produktajn konsilantojn. En apliko de nova tekniko, li unue faras eksperimentadon kune kun ili. Iatempe, li kunvokis ilin por trovi pliproduktan rimedon. En ĉiu jarfino li okazigas kunvenon de komunumanoj por resumi la laborojn, aŭskulti opiniojn de la amasoj kaj anstataŭigi kadrojn, kiuj ne persistas en socialisma vojo kaj faris seriozan eraron, per nove elektitaj.

En tia demokratia atmosfero, la kadroj tre volontas aŭskulti opiniojn de la amasoj, kiam ili renkontas malfacilojn en produktado. Ekzemple, en la movado de lerno de Daĝaj en agrikulturo la ĉirkaŭaj produktaj brigadoj multe ĉerpis subteran akvon por akvumi kampojn, kaj rezulte de tio malaltiĝis la nivelo de la subtera akvo de la antaŭe akvomanka Nanhangi-brigado kaj sekigis plejparto de ĝiaj putoj. Kion fari? Hju Kingven konsiliĝis pri tio kun la kadroj kaj la lastaj diris, ke ili okazigu kunvenon de la komunumanoj kaj aŭskultu iliajn opiniojn. Poste, la amasoj prezentis multajn bonajn ideojn. Iu diris, ke ilia brigado povas bori putojn en najbara brigado, kie abundas subtera akvo, por alkonduki akvon. Iu diris, ke ilia brigado situas alte,

akvo de la borotaj putoj ne povos atingi ĝin. Iu proponis, ke oni altigu la akvonivelon. Iu dubis, ĉu la najbara brigado konsentos se ili fosos kanalon sur iliaj kampoj? Alia diris, ke en la pasinteco oni fosis tunelojn por batali kontraŭ japanaj agresantoj, nun oni ankaŭ povas fosi subteran kanalon por alkonduki akvon. En la diskutado formiĝis plano de borado de putoj en najbara brigado kaj fosado de subtera akvokonduka kanalo. La afero estis decidita post konsiliĝo de la komunumo kun la najbara brigado. Post klopodo de kelkaj jaroj, la manko de akvo en irigaciado estis solvita. Post ordigo de kampoj kaj plibonigo de la grundo, pomua produktokvanto de greno de Nanhangi-brigado pliigis de pli ol 100 kg. en la koopera periodo ĝis pli ol 650 kg. (1 muo = 1/15 hektaro).

Kompreneble, planoj de Hju Kingven kaj aliaj kadroj ne estis ĉiam ĝusta, sed ili fariĝis pli raciaj post aŭskultado de amasaj opinioj. Ni prenu la distribuon de la jaro 1977 kiel ekzemplon. La distribuo estis farita de la brigado. Laŭ la principo de socialisma distribuo, t.e., laŭ la totala enspezo de la brigado kaj la malsamaj produktokvantoj kaj kontribuoj de la tri taĉmentoj, la brigado decidis, ke la valoro de taglaboraj poentoj de la tria taĉmento estu pli alta ol tiu de la unua kaj tiu de la unua taĉmento pli alta ol tiu de la dua. Sed, en diskutado de la distribua projekto multaj komunumanoj diris, ke la diferenco de la valoroj de taglaboraj poentoj inter la tria kaj dua taĉmentoj estas tro granda. Poste, Hju Kingven kaj aliaj kadroj trovis, ke la opinio de la amasoj estas ĝusta kaj, laŭ la spirito malgrandigi la diferencon, decidis iom pliigi la valoron de taglaboraj poentoj de la dua taĉmento. En diskutado de la nova distribua projekto, la komunumanoj opiniis ke ĝi estas pli racia kaj donis sian aprobon.

En la tago, kiam la brigado faris distribuadon, iu onklino diris, tenante la ricevitan monon: "Mi antaŭe opiniis, ke mi ricevos malpli multan kontantan monon ol en la lasta jaro, ekster mia atendo, mi ĉijare ricevis monon pli multan je 70 juanoj. Nia vivo ja fariĝas pli bona jaron post jaro!"

Pri insignoj

MI tre ŝatas belajn insignojn* kaj ofte estas allogataj de tiuj brilaj sur alies brustoj. Ifoje, por akiri belan insignon mi faris ĉiajn klopodojn. Mi portis ĝin sur la brusto je pluraj tagoj kaj ĝin konservis atente. Aprezi ilin en libertempo estas por mi agrabla arta ĝuo.

Ili ne nur estas artaĵoj, sed ankaŭ havas ian memorigan signifon. Kvankam forpasis la memorigaj aktivadoj, tamen la insignoj povas rememorigi vin pri la pasintaj scenoj.

Kiel plastikaj artaĵoj, la insignoj postulas, ke la projektantoj klare prezentu la ideon de temo per konciza arta metodo. Samtempe, oni devas reliefigi al ili ornaman efikecon per helaj koloroj kaj harmonia komponado, por ke malgrandaj insignoj havu memorigan signifon kaj plaĉu al la portantoj.

Bona verkaĵo estis la insigno de la Unua Tutlanda Sporta Kunveno de Ĉinio okazinta en 1959. Ĝia ovala ekstera formo ornamita de kvin oraj kurlinioj klare montris, ke ĝi estas insigno de sporta kunveno. La projektanto donis trionon da spaco al la vorto "1" por emfazi la "unuan". La rompo de la pinto de la "1" je la kurlinioj simbolas, ke la sporta afero de la nova Ĉinio disvolviĝas rapide kiel sago. La koloroj ruĝa, blanka kaj ora

harmonie aranĝitaj sur la insigno ĝin faris okulfrapa kaj forte impresa.

Ankaŭ la "Insigno de Fervojistoj" estas multe ŝatata de la fervojistoj. Ĝia desegno konsistas el la du ĉinaj ideografiaĵoj "工" kaj "人", kiuj signifas "laboriston". La desegno videblas kiel lokomotivo, kiu reprezentas la "fervojon de la popolo". Ĝia projekto estis kuraĝa, lerta, simpla kaj signifoplena. Tiu desegno estis elektita el miloj da projektoj de la tuta lando.

Mi ŝatas ankaŭ la emblemon de la "Ligo de Montgrimpa Sporto de Ĉinio". Ĝi havas nur du kolorojn, el kiuj la blanka simbolas la Montaron Himalajon, la blua la ĉielon kaj la blanka cirklo malsupre de la montaro la nubotavolon. Estas pli interese, ke sur la montpinto estas ruĝa punkto, kiu simbolas la kvin-stelan ruĝan flagon de Ĉinio starigitan sur la plej alta firsto de la mondo — Ĝomolangma.

Mi havas ankaŭ insignon: Sur la blanka fono estas desegno de fiŝo kun neniuj vorto. Tio estas insigno de la Muzeo de Restadejo de Banpo-vilaĝo de Ŝenhi-provinco de Ĉinio. La desegno de geometria fiŝa figuro estas bildo sur antikva porcelana peco elfosita de la nomata restadejo. Ĝia projekto havas originalecon, primitivecon kaj ornamecon.

La insigno "Amika Festivalo inter Ĉinio kaj Japanio" en 1965 estas bela floro kun koloroj helruĝa, flava kaj blua, simbolanta festan ĝojon. Estis interese, ke la projektanto lerte formis du ideografiaĵojn "Ĉinio" kaj "Japanio" el la petaloj, kiuj simbolas amikecon inter la ĉina kaj japana popoloj.

Mi volas prezenti ankoraŭ la insignon de la "Tablotenis Invita Turniro de Azio, Afriko kaj Latinameriko" okazigita en Pekino je 1975. Ĝia desegno estas floro formita de tri tablotenisaj batiloj kun tri "A" -oj prenitaj de la unua litero el la tri vortoj "Azio", "Afriko" kaj "Ameriko Latina", kiuj simbolas la tri kontinentojn, la tri montarojn Himalajo, Kilimanĝaro kaj Andoj kaj la popolojn de la tri kontinentoj stariĝantaj kiel kolosojn. La meza rubando simbolas la unuiĝon de la popoloj. Kiom riĉan signifon enhavas la malgranda insigno! Ĉio ĉi tio montras la artan talenton de projektantoj.

Mi estas amato de insignoj kaj kolektis pli ol 1,000 insignojn en multaj jaroj. Ili ne nur aldonis intereson al mia vivo, sed ankaŭ plivastigis al mi la vidkampon kaj scion. Mi profunde sentis, ke unu bona insigno vere donas al homoj inspiron kaj ĝuon pri beleco.

* Bonvole vidu, pri la insignoj menciitaj en la artikolo, la kolorpaĝon de ĉi numero.



JONO-DETEKTA MIKROMAS-SPEKTROGRAFO

La Ĉina Akademio de Sciencoj kaj koncernaj institucioj mem projektis kaj sukcese faris la unuan LT-I-tipan radituŝan jono-detektan mikromas-spektrografon de nia lando.

Ĝi estas grandtipa preciza scienca aparato aperinta eksterlande en la lastaj dek jaroj. Tiu aparato estas uzata al maldiktavola analizo en mikrosurfac-regiono ĉefe en esplorado de transistora integrocirkvito, solid-stata fiziko, surfaca scienco, materiala scienco, mediologio, tergloba kaj kosma scienco, biologio kaj aliaj.

Lastatempe, la Ĉina Akademio de Sciencoj faris al ĝi ekspertizon post prova mezurado kaj konstatis, ke ĝi bone funkcias kaj povas esti produktata pogrande.

LASERA HOLOGRAFIA FOTOELASTA APARATO

La Fabriko de Optikaj Aparatoj de Pekino sukcese faris, sub helpo de koncernaj institutoj, laseran holografian fotoelastan aparaton kaj komencis pogranda produktaĉdon.

Lasera holografia fotografio estas nova tekniko disvolvita en la sesdekaj jaroj. La supre dirita aparato

aplikas tiun novan teknikon al eksperimento de fotoelasteco kaj estas avangarda fizika optika aparato uzata en maŝinfarado, konstruado, minejoj kaj projektado de pontoj kaj tuneloj. Tiu tekniko povas multe altigi la precizecon kaj mallongigi la tempon de kalkulado kaj analizado.

ELEKTRONIKA PESILO POR MOVIĜANTA VAGONO

La nomita pesilo estas lastatempe sukcese farita de koncernaj unuoj de Hubej-provinco kaj jam donita al uzado por pesi ŝarĝitajn varvagonojn.

La pesilo estas relative malgranda kaj facile fabrikebla kun malmulta produktokosto. Ĝi konsistas el elektronika kalkula sistemo kaj meĥanika sistemo. Kiam vartrajno sen disigo de la vagonoj stabile trapasas la surfacon de la pesilo kun hora rapideco de 3-5 kilometroj, la pesilo povas tuj aŭtomate montri kaj registri la pezon de ĉiu vagono, elkalkuli la totalan pezon de la vagonaro sen tiu de la lokomotivo, kaj aŭtomate alarmi, kiam la vagonaro trapasas tro rapide. En kelkaj minutoj post trapaso de la trajno, oni jam povas ricevi la rezulton de la pesado. La eraro en la pesado estas malpli ol 0.41%.

DOMO DE SCIENCA AKTIVADO

La unua domo de scienca aktivado en Anhuĵ-provinco jam konstruiĝis en Hefeĵ kaj malfermiĝis al la sciencaj kaj teknikaj laborantoj kaj popolamasoj.

Tiu domo estas sep-etaĝa konstruaĵo kun totala plankareo de pli ol 6,000 kvadrataj metroj. En ĝi sin trovas esplora fako de sciencaj kaj teknikaj informoj, salono por elmontri kaj legi sciencajn kaj teknikajn materialojn, ekspozicio por

novaj produktaĵoj kaj novaj teknikoj, scienca kurso kaj kinejo por projekcii sciencajn kaj teknikajn filmojn, kaj oficĉambroj. Tiu domo pretigos favorajn kondiĉojn por interŝanĝi spertojn, ĝeneraligi sciencajn sciojn kaj disvastigi sciencajn eltrovojn kaj teknikajn renovigojn de Anhuĵ-provinco.

GRANDA FOSFORMINO

Geologia taĉmento de Guĵoŭ-provinco trovis grandan riĉan fosforan minon en Fukĵuan de tiu provinco.

En la lasta jaro, la taĉmento tra legis multajn materialojn de nia lando kaj fremdaj landoj pri sedimenta fosformino, faris profundan esploron al la koncernaj stratumoj kaj iliaj paleogeografio kaj paleostrukturaj kondiĉoj, plurfoje faris prospektoradon kaj kemian analizon pri specimenoj kaj fine venis al la konkludo: Ĝi estas mino granda, riĉa, facile ekspluatablebla ĉe loko kun facila trafiko, kaj krome ĝi havas abundan kunesstantan jodon.

Nun, tiu mino estas jam ekspluatata.



Kanto de la juneco

(Daŭrigo)

XIII

Daŭging estis bruliganta en la korto la fornon por prepari la manĝon, kiam ŝi, levinte la kapon, ektrovis ke envenas Lu Giaĉuan. Ŝi tuj demetis la balaajujon kun karbbuloj en ĝi kaj haste volis konduki lin en la ĉambbron, lasante flami la brulignon en la forno.

“Kio? Vi ankoraŭ ne donas la karbbulojn? La ligno baldaŭ forbrulos!” Ridetante Lu Giaĉuan paŝis al la forno kaj verŝis en ĝin la karbbulojn el la balaajujo. Tuj sekve, leviĝis el la malgranda forno densa kolono da nigra fumo. Daŭging, kiu sentis jam honton, ke li vidas ŝin okupata en la hejmaj bagatelaĵoj, nun fariĝis des pli konsternita, kiam li tiel lerte helpis ŝin.

“Frato Lu, delonge mi ne vidis vin...” diris ŝi konfuzite. “Iru en la ĉambbron kaj sidiĝu! Kiel vi fartas lasttempe? Oh, vi scias, kiel mi esperis...” Ŝi staris en la ĉambro kaj parolis entuziasme sed senorde. La gasto tamen aplombe premis al ŝi la manon, metis seĝon ĉe la pordon kaj sidiĝis, dirante kun rideto kaj la rigardo fiksitita sur ŝi:

“Kiel vi pasigis la lastajn tagojn, eta Lin? Pro okupiteco, mi jam longe ne venis vin vidi.”

Daŭging penis kvietigi sin. Ŝiaj okuloj ekbrilis de spontanea respekto kaj ankora ŝojo pro la revidiĝo kun li. Ŝi apogis sin ĉe la rando de la tablo kaj respondis delikatvoĉe, ankoraŭ kun hontemo kaj maltrankvilo:

“Frato Lu, mi legis en la lastaj tagoj multajn librojn kaj ekkomprenis multe da aferoj. Mia

spirito ŝanĝiĝis...” Kun vizaĝo flamanta, ŝi ne sciis, kiel sin esprimi. Post paŭzo, kiam ŝi vidis, ke Lu Giaĉuan ne rimarkas ŝian konsternon kaj ekscitiĝon, ŝi plene kvietiĝis kaj komencis rakonti al li la legitajn de ŝi librojn, la influojn kiujn ili donis al ŝi, kaj la ŝanĝojn en ŝia animstato. Ju pli ŝi rakontis, des pli ŝi entuziasmiĝis. Iom post iom tute malaperis ŝia konfuziĝo kaj maltrankvilo. Ŝi aldonis, ĝojmiene, kun la kapo flanken klinita: “Frato Lu, kia mirindaĵo! Tiel rapide mi jam fariĝis alia persono; ŝajnas, ke mi multe pli juniĝis!”

“Estante ne maljuna, kiel vi povas pli juniĝi?” Lu Giaĉuan rigardis ŝin, kun okuloj duonfermitaj. Vagis sur liaj lipoj petola rideto.

“Ne, vi ne pravas,” diris ŝi tute serioze. “Vi ne scias, frato Lu, ke mi, kvankam nur 20-jara, delonge jam similis al maljunulino pro la pasintaj travivaĵoj. Mi havis intereson pri nenio; mi perdis ĉian esperon; mi dronis tiom profunde en la pesimismon, ke mi pensis pri sinmortigo... Sed post kiam mi konis vin kaj aliajn en la novjara antaŭvespero, post kiam mi legis la librojn, kiujn vi rekomendis al mi, mi subite aliiĝis...” Ŝi hazarde ekturnis la kapon kaj trovis, ke, oni ne scias de kiam, Ju Jongze staras en la mezo de la ĉambro. Vidante liajn malgrandajn okulojn kolere kaj strabe najlitajn sur Lu Giaĉuan, ŝi abrupte haltigis sian parolon. Kaj, antaŭ ol ŝi rekomencis ĝin, li turnis sin al ŝi kaj diris, kun brovoj kuntiritaj:

“La fajro jam arde brulas en la forno, kial vi ankoraŭ ne iras prepari la manĝon? Ĉu la teoria parolado povas servi kiel manĝaĵo?” Sen atendi

ŝian respondon, li salte elkuris, jetfermante la pordon post si.

Sidanta sur tabureto, Daŭging fariĝis kvazaŭ grenplanto velkanta pro atako de prujno. Por kelka momento ŝi ne povis diri eĉ unu vorton, kun vizaĝo ruĝiĝinta de indigno. Lu Giaĉuan, kiu estis spertoriĉa kaj trankvila, nun jetis rigardon al Daŭging. Li ekstaris kaj paŝis al ŝi.

“Tiun ĉi fraton Ju mi iam vidis. Vi ja devus, eta Lin, prepari la manĝaĵojn pli frue por li, kiu malpacience atendas la manĝon. Nia interparolado ne devas malhelpi lin. Enportu la fornon. Vi kuiros kaj samtempe ni daŭrigos la babilojn, ĉu bone?”

“Bone!” Daŭging, kiu timis, ke la gasto koleriĝus kaj forirus, nun sentis grandan ĝojon, ke li promesis resti. Ŝi tuj enĉambrigis la fornon, kaj metis sur ĝin la kaserolon. Iom post iom, ŝia indigno ŝanĝiĝis en pezan malĝojon. Ŝi klinis la kapon, kaj diris rigardante la teron: “Montru al mi rimedon, frato Lu! Ĉi tia vivo estas ja tiel sufoka, ke mi apenaŭ povas spiri...” Ŝi relevis la kapon kaj el ŝiaj okuloj elradiis eksterordinare ardaĵ briloj. “Ĉu vi povas helpi min aliĝi al la Ruĝa Armeo aŭ al la Komunista Partio? Mi kredas, ke mi povas fari la revolucion. Se ne, ankaŭ estus bone, ke mi iru al la Volontuloj de la Nordoriento.”

“Oh!” ŝajnis, ke Lu Giaĉuan estas surprizita de la neatendita peto. Kiel simple tiu juna knabino imagas la partoprenon en la revolucio! Li rigardis ŝin, kaj, hezitinte momenton, demandis: “Kial? Kial vi volas aliĝi al la Ruĝa Armeo?”

“Mi preferas esti jado rompita ol tegolo integra! Mi ne volas, ke mia vivo forpasu tiel banale kaj sensignife. De infanaĝo mi havas la volon ne vane pasigi la vivon. Se la malluma socio ne permesas min vivi ĝojanime, mi preferas morti!” Ŝia vizaĝo flamiĝis, kaj brilis ŝiaj nigraj okuloj. Ŝi daŭrigis: “Tamen, leginte la librojn



revoluciajn, kiujn vi donis al mi, mi ekkomprenas la veron kaj decidas morti por ĝi. Mi opinias, ke oni devas vivi kiel la herooj, kiel tiuj, kiuj morton spitas. Frato Lu, lasu min iri al la ardanta batalkampo; mi ne povas toleri la nunan vivon plu!”

Lu Giaĉuan, sidante sur la seĝo, delikate manfrapis la tablon, kvazaŭ li estus batanta takton por ŝia fluo da vortoj. Li skuis la kapon, kaj denove saltetis en liaj viglaj okuloj la petola rideto apenaŭ rimarkebla.

“Eta Lin, ni unue diskutu problemon. — Vi devas ekkirli la kuiratan rizon; alie, ĝi karbiĝos. — Pasinttempe vi luktis kun via familio kaj malkontentis pri la malluma socio. Nun vi deziras tuj iri al la revolucio, al la batalkampo. Kion vi celas per ĉio ĉi tio?”

Konfuzita de la demando, ŝi enpenŝiĝis, kun lipoj forte kunpremitaj, forgesante kirli la rizon, kiu efektive eligis odoron de karbiĝo. Lu Giaĉuan ekstaris, kirliis, kelkajn fojojn la rizon kaj transmetis la kaserolon de la centro al rando de la forno, por rosti la rizon per malforta fajro. Dume, ŝi restis en sia meditado kaj tion ne rimarkis. Post longa momento, ŝi murmuris, perplekse rigardante al li:

“Mi, mi ne bone pripensis tion... Sed mi kredas, ke mi ne celas mian personan intereson. Mi abomenas egoistojn.”

“Sed probable tiuj pensoj kaj agoj de vi tamen celas personan intereson!”

Daŭging ekstaris abrupte kaj demandis: “Ĉu vi volas diri, ke mi estas egoistino?”

“Ne, mi ne tion aludis,” Lu Giaĉuan ekaspektis tre serioza. Liaj okuloj penetre direktiĝis al Daŭging. “Permesu min demandi: En la pasintaj jaroj vi kuradis tien kaj ĉi tien, vi plendis pri tio kaj ĉi tio, vi sentis aflikton kaj ĉagrenon, sed por kio? Ĉu por la laboranta popolamaso? Aŭ por vi mem? Nun vi pensas pri aliĝo al la Ruĝa Armeo, al la Komunista Partio, por fariĝi heroino... Pripensu: ĉu vi celas savi la popolon el la abismo de suferoj, aŭ realigi vian revon, revon de heroo, por eviti la ordinaran vivon, kiun vi vivas?”

Daŭging ekŝtoniĝis de konfuziĝo, kaj iom poste ŝi ekridis. La vortoj de Lu Giaĉuan akre penetris en la profundon de ŝia koro. Ŝi eksentis honton, kaj respondis post longa silento, kun la kapo flanken klinita:

“Vi pravas, frato Lu. En la pasinteco mi nur volis esti bona homo, nek ofendanta nek ofendata. Eble tio estas la tiel nomata ‘nura zorgo pri propra senpekeco’? Vere, mi malmulte pensis pri aliaj. Sed estas afero, kiun mi ankoraŭ ne komprenas: mi ŝatas helpi la malriĉulojn, ofte donante miajn ŝparitajn monerojn al rikŝotiristoj kaj almozuloj. Ĉu tio ankaŭ signifas celi personan intereson?”

“Miaopinie,” kapbalancis kaj diris Lu Giaĉuan, “la konduton de unu persono — inkluzive ĉiujn

liajn klopodojn kaj laborojn — oni devas taksu ne nur laŭ la motivoj de liaj agoj, sed ankaŭ laŭ iliaj rezultoj. Laŭ tio, ĉu li kontribuas al la progreso de la socio, aŭ li intencas origi tiun ĉi putriĝintan socion, aŭ li celas ĝin konservi...” Tra liaj palpebraj komisuroj kuris delikata kaj signifoplena rideto. Li singardeme ĵetis rigardon tra la pordo, kaj poste al la malbeninda kaserolo. Li daŭrigis: “Eta Lin, ĉu per via monhelpe al kelkaj rikŝotiristoj kaj almozuloj vi povas solvi la problemon de vivtenado por la miloj da rikŝotiristoj kaj almozuloj? Je kio tio utilis al la tuta socio kaj la laboranta popolo krom kontentigi vian personan aspiron fariĝi ‘bona homo’?... Aliĝi al la Ruĝa Armeo kaj iri al la batakampo estas bona deziro, sed ĝi devas sin bazi sur la realaj kondiĉoj. Tre varia estas la laboro revolucia, kiu inkluzivas intensan batalon korpon kontraŭ korpo, sed ankaŭ ordinaran lukton, kiu atenton ne altiras.” Li ree turnis la rizkaserolon odorantan je karbiĝo kaj ĵetis rigardon al ŝi. “La kuiradon, la lavadon de vestoj kaj aliajn bagatelaĵojn, kiujn vi faras, ni ankaŭ devas fari, se ili estas utilaj por la popolo kaj la revolucio kaj estas necesaj. Ne la lukto sur batakampo sole signifas revolucion... Nu, eta Lin, kiel do? Ĉu vi nepre volas fariĝi heroino preta por oferi sian vivon sur la batakampo?”

Lu Giaĉuan ekridis. Ankaŭ Lin Daŭging ridis. Ŝia animo balanciĝis kun liaj vortoj, kiel barko sur ondoj. Kiam ŝi rimarkis, ke li estis al ŝi konsilanta kun amika kaj malkaŝema sincero, rapide forpasis ŝia malkontento pro ofendiĝo de ŝia fiero kaj memestimo. Lia sincera rido kaj kapbalanciĝo montranta prizorgemon al ŝi lasis en ŝia koro tian plezuron, kian ŝi neniam havis antaŭe.

“Mi kore dankas vin, frato Lu!” Ŝiaj ruĝiĝintaj vangoj radiis de ĝoja rideto, kaj ŝiaj belaj okuloj larĝe malfermiĝis kaj brilis.

“Nu, jam estas tagmezo. Ĉu la manĝo estas preta?” Ju Jongze enŝteliĝis en la ĉambron kiel kato. Nun li ĵetis sian ĉapelon en la liton kaj peze eksidis sur la litrandon, kun la okuloj senmove najlitaj al Daŭging.

Ŝia vizaĝo tuj paliĝis. Ŝi rigide rigardis al Ju Jongze, ne sciante kion diri. Ŝi ja ne volis kvereli kun li en la ĉeesto de Lu Giaĉuan.

Tiu ĉi, tre saĝa, tuj prenis sian ĉapon, kiam li vidis la mienojn de la gemastroj. Li kapbalancis ridetante al Ju Jongze, kaj poste diris al Daŭging, kun la sama aplomba rideto:

“Hodiaŭ nia interparolo iris tre bone... Nun vi manĝu; mi foriras.” Li refoje kapsalutis al Ju Jongze kaj iris el la ĉambro. Silente lin sekvante, Daŭging akompanis lin ĝis la enirejo de la domo. Kiam ŝi, senvorte, kun lipoj firme kunpremitaj, returnis sin por reveni al la ĉambro, ŝi trovis Ju Jongze malantaŭ si. Lia osteca vizaĝo tiriĝis tiel longa, kiel tiu de la funebra dio.

Tiun nokton, Daŭging enlitiĝis nenion manĝinte. Ŝi estis tordita de multaj komplikaj sentimentoj kaj pensoj. Dum longa tempo ŝi ne povis endormiĝi. Ŝi malfermis la okulojn kaj trovis, en la duonhela lamplumo, ke Ju Jongze medite sidas ĉe la tablo, kun kapo klinita. Ŝiaj okuloj ekpleniĝis de larmoj.

“Ĉu tiu estas la persono kiun mi varme amis kaj adoris?...” Ŝi rapide kaŝis la kapon sub la litkovrilon, por ke li ne aŭdu ŝian doloran ploron.

Ju Jongze enpensiĝis, sidante ĉe la tablo. De longe li jam informiĝis, ke Lin Daŭging havas proksimajn rilatojn kun Lu Giaĉuan. Hodiaŭ, vidinte ilian intiman interbabiladon, li pli bone komprenis, kial ŝi ŝanĝiĝis. Li tutforte detenis sin de eksplodo kaj li pensis ke, kiel digna viro, li ne devas ĉagreni sin pro virino. Tamen, kiam ŝvebis en lia rememoro la brila, rava aspekto kaj la eleganteco de Lu Giaĉuan, kaj la grandaj okuloj de Daŭging, kiuj, radiantaj de ĝoja pasio, fiksiĝis sur Lu, li denove estis kaptita de doloro kaj kolero. Li sidis ekscitita sur la seĝo kaj pensis multe kaj longe. Sed li trovis neniun rimedon. Daŭging estas virino obstina, kiu havas sian memstaran penson. Oni ne povas konvinki ŝin per argumentoj, nek tuŝi ŝin per larmoj, nek — des malpli — minaci ŝin per forto. Kion fari? La saĝa Ju Jongze fine elpensis mirindan ideon: skribi leteron al Lu Giaĉuan, por lin admoni kaj averti, ke li observu la homan moralon.

La letero legiĝis jene:

Sinjoro Lu:

Vi kaj mi ambaŭ studas en la Pekina Universitato; via parenco kaj mi estas samvilaĝanoj; kaj inter vi kaj mi neniam okazis malpaco. Sed vi pretekstas la propagandon pri la doktrino por sorĉi kaj sklavigi mian edzinon Daŭging, kiu nun ĉiam havas la vortojn revolucio kaj lukto sur la lipoj. Mia feliĉa familia vivo suferas detruigon, dum vi sentas vin kontenta, plezura, agrabla kaj ravita pro efektiviĝo de via intenco... La homo devas plenumi homan moralon. La homo ne devas rompi alies feliĉon per agitaj paroloj; alie, li kondukos kontraŭ la homaj konscienco kaj virtoj. Jen estas mia konsilo. Bonvolu pensi kaj repensi, ĉu ĝi pravas, kaj mi deziras al vi prudenton.

Ju Jongze
Marto de 1933

Kiam li finis la skribadon, lia koro iom malpeziĝis, kvazaŭ malŝarĝita. Li fermis la leteron, stariĝis kaj etendis la membrojn. Li paŝis al la lito kaj trovis, ke Daŭging jam endormiĝis. Ŝia mieno, trankvila kaj milda, similis al marmora reliefo. La mallongaj kaj molaj nigraj haroj parte falis sur la pufetaj vangoj de blankjada koloro, montrante per tio belecon ĉastan kaj puran. Poste li vidis, ke sur ŝiaj lipoj flosis rideto, dum brilis larmoj sub la okuloj. “Ŝi ploris?...” Antaŭ tiu ĉi impresio, lia tuta kolero tuj cedis lokon al ia speco de kompato. Li eksentis, ke ŝi ne estas ordinarulino, sed virino kun noblaj idealoj. Li devas ŝin kompreni kaj pardoni... Starante antaŭ la lito, li rigardis ŝin kaj diris en si: “Ŝi estas bonkora, sincera; ŝi ne povas trompi min kaj ami alian. Pro kio mi malkvietiĝas senmotive?...” Li eksereniĝis kaj trankviliĝis. Li klinis sin kaj donis al ŝi delikatan kison sur la vango. Kaj li decideme ĵetis la ĵus skribitan leteron en la estingiĝantan fornon. Rigardante la flamojn vomitajn el la forno, li sentis sin farinta ian grandiozan heroaĵon. Li fiere levis la brakojn kaj etendis kelkfoje la pugnojn. Post kelkaj oscedoj, li rapide demetis la vestojn kaj enlitiĝis.

(Daŭringota)



Ĝoŭkoŭdian — “hejmo” de la Pekin-homoj

de HUANG VEJVEN*

ĈE la piedo de la Okcidenta Montaro je 50 kilometroj sud-okcidente de Pekino sin trovas malgranda kampara urbo — Ĝoŭkoŭdian. Ĝi estis ŝtonhakejo kaj centro de kalkofarado kun longa historio. De kiam oni trovis tie, antaŭ duona jarcento, prahomojn vivintajn antaŭ 400,000-500,000 jaroj — Pekin-homojn, ĝi famiĝis tra la tuta mondo kiel “hejmo” de la Pekin-homoj.

La “hejmo” de la Pekin-homoj efektive estas grandega natura kaverno sur la norda deklivo de la Drakosta Monto kovrata per arboj okcidente de Ĝoŭkoŭdian.


Antaŭ 400-500 milionoj da jaroj la norda Ĉinio, kie sin trovas Ĝoŭkoŭdian, estis vasta maro, kaj la sedimento funde de la maro formis kalkoŝtonojn. Poste, pro movado de la terkrusto, la marfundo fariĝis tersurfaco, kaj pli poste, pro longtempa erozio, formiĝis montpintoj unu post alia. Kaj la Drakosta

Monto estas unu el ili. Ĝi staras dorse al ondanta montaro kaj fronte al senlima ebenaĵo. Unu rivereto fontanta el nemalproksima ravino en ĝia nordo zigzage fluas suden laŭlonge de la montpiedo. Pro longtempa erozio de la riverakvo kaj aliaj naturaj fortoj formiĝis iom post iom, sur kalkoŝtonoj, multaj grandaj kaj malgrandaj fendoj kaj kavernoj, kiuj servas kiel bonaj lokoj por konservi animalajn fosiliojn kaj homajn fosiliojn kaj restadejojn. La Drakosta Monto akiris sian nomon ĝuste pro tio, ke ĝi abundas je “drakaj ostoj”, kiaj la lokanoj nomas fosiliojn de mamuloj.


En tiu kaverno la Pekin-homoj loĝadis pli ol 300,000 jarojn. En tiu periodo puŝiĝis senĉese en la kaverton sablo kaj kotajo kaj faladis de ĝiaj tegmento kaj muroj ŝtonpecoj. Iom post iom ŝtopiĝis la vasta kaverno kaj poste eĉ la tuta kaverno estis enterigita. La senhejmaj Pekin-homoj transloĝiĝis ali-

loken, tamen en la kaverno restis iliaj manĝaĵoj, iloj kaj eĉ iliaj ostoj.

Ankaŭ Drakosta Monto estis ŝtonhakejo. Dum ŝtonhakado laboristoj trovis tiun enterigitan “hejmon” de la Pekin-homoj. Informiĝinte pri tio, sciencistoj venis tien en 1921 kaj 1923 por esplori. Ili trovis ne nur nombron da animalaj fosilioj, sed ankaŭ fosiliojn de du homaj dentoj. Post ekzameno ili konstatis, ke tiuj estis dentoj de prahomoj. Tiam troviĝis nur unu speco de fosilioj de prahomoj vivintaj antaŭ 500,000 jaroj, t. e. la Javo-homoj trovitaj en Indonezio en 1891. La alia trovo de fosilioj de tiaj prahomoj en Azio, precipe en Ĉinio norde de la Himalaja Montaro, vekis grandegan intereson de sciencaj rondoj. De 1927 sistema elfosado estis farita en Ĝoŭkoŭdian en sinsekvaj dek jaroj. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio aliaj pluraj grandskalaj elfosadoj estis faritaj. En la meza parto de la kaverno oni formovis ĉirkaŭ 26,000



Panoramo de la restadejo de la Pekin-homoj



Ŝtonaj instrumentoj uzitaj de la Pekin-homoj
Skrapilo (maldekstre) Pintaĵo (dekstre)


kubmetrojn da amasigitaĵoj kaj ĝiaj okcidenta kaj orienta partoj estas ankoraŭ netuŝitaj. Ilia kuna volumeno estas pli granda ol tiu de la meza parto. Laŭ la sfero de la amasigitaĵoj sciencistoj konstatis, ke la kaverno longas ĉirkaŭ 140 metrojn de oriento ĝis okcidento kaj larĝas je 42 metroj de nordo ĝis sudo, kaj la amasigitaĵoj altas je pli ol 40 metroj.

El la elfositaj amasigitaĵoj oni trovis fosiliojn de pli ol 40 Pekin-homoj inkluzive de viroj, virinoj, maljunuloj kaj infanoj. Per tiuj fosilioj oni povas restarigi la fizionomion de Pekin-homo: elstarantaj brovostoj, mallarĝa kaj ebena frunto, antaŭen etendiĝanta buŝo k. a., iom similan al gorilo. La volumeno de ilia kranio estis du trionoj de tiu de la moderna homo. Plenkreskanta Pekin-homo estis alta je ĉirkaŭ 1.56 metroj, iom malpli alta ol la moderna homo. La Pekin-homoj vivis en la lasta duono de meza plejstoceno, t. e. unu el la tempoj de evoluo de simi-homo al saĝa homo (inkluzive de moderna

homo). La eltrovo de fosilioj de la Pekin-homoj, dekmiloj da ŝtonaj objektoj kaj fajrouzaj lokoj forte pruvis la teorion de Engels pri tio, ke laboro kreis la homon, kaj tiuj elfosaĵoj rekte pruvis, ke la homo devenis de simi-homo.

Ŝtonaj instrumentoj estis ĉefaj el la uzitaj iloj de la Pekin-homoj. Inter ili ĉefe estis splitaĵoj, skrapiloj kaj pintaĵoj faritaj el sabloŝtonetoj kolektitaj en riverplaĝoj kaj el pecoj de vejna kvarco kolektitaj en montregiono. Per ili la Pekin-homoj faris lignajn lancojn, kiujn ili uzis por ĉasado kaj tranĉis ĉasaĵojn. En la restadejo oni trovis ankaŭ grandan nombron da instrumentoj faritaj el bestaj ostoj.

Inter la aliaj materialoj trovitaj kune kun fosilioj de la Pekin-homoj la plej interesaj estas atestaĵoj de fajrouzado de la Pekin-homoj. En la kaverno konserviĝas cindro ruĝa, flava, blua kaj nigra, en kiu troviĝas granda nombro da pecetoj de lignaj karboj kaj karbiĝintaj ostepecoj. La kemia analizo pruvis, ke ĝi



Pekin-homo kun ĉasajo


estas cindro de arta fajro. Ie en la kaverno tia cindroamaso dikas je 6 metroj. Tio montris, ke la Pekin-homoj jam kapablis konservi fajron. Antaŭ tio, en iuj lokoj de Eŭropo oni trovis fajrouzajn lokojn de fruperiodaj homoj, kiuj apartenis al tempo malpli frua ol tiu de la Neanderthal-homoj antaŭ ĉirkaŭ 100,000 jaroj. Nun la eltrovo de la Pekin-homoj multe longigis la historion de fajrouzo de la homaro. En la periodo de la Pekin-homoj fajro estis uzata por varmigi, lumigi kaj protekti de atako de rabobestoj kaj dank' al ĝi la kaverno fariĝis ŝirmejo por homoj. Oni uzis fajron por rosti manĝaĵojn, dank' al kio mallongigis digestado, multiĝis nu-

troj, plivastigis fonto de manĝaĵoj kaj pretiĝis sufiĉe multaj kemiaj kondiĉoj por evoluo de korpo kaj cerba volumeno de la homoj. El la manĝaĵoj de la Pekin-homoj viandoj konsistigis la grandan parton, inter kiuj ne nur estis malgrandaj bestoj kiel musoj, sed ankaŭ grandaj bestoj kiel cervoj, aproj, ĉevaloj kaj akvaj bubaloj. Ĝuste en la periodo de la saĝaj homoj



Suprakaverna homo

Supra Kaverno



en la frua periodo de supra plejstoceno, kiu interligiĝas kun la periodo de la Pekin-homoj, la cerba volumeno de homo atingis nivelon de la moderna homo.

En la kaverno oni trovis preskaŭ cent specojn de fosilioj de diversaj mamuloj. Inter ili estis rinoceroj kaj elefantoj, kiuj kutimis vivi en varmeta kaj humida klimato, densa arbaro kaj marĉejo; marmotoj kaj kavernaj ursoj vivantaj en frosta zono; grandaj kastoroj, lutroj kaj akvaj bubaloj vivantaj en humida kaj varma regiono aŭ ĉe akvorando; strutoj kaj kameloj vivantaj en seka loko; simioj, tigroj, leopardoj, leonoj k. a. vivantaj en arbaro de varma zono kaj ankaŭ ĉevaloj, antilopoj kaj cervoj vivantaj sur stepo. Se oni imagus tiaman naturan medion laŭ vivkutimoj de tiuj animaloj, ĝi certe estus riĉkolora tamen nekomprenbla bildo. Sciencistoj opinias, ke relative racia klarigo pri ĝi devas esti: En kelcent mil jaroj, en kiuj vivis la Pekin-homoj, la natura medio plurfoje ŝanĝiĝis. Iam arbaro plivastigis pro humideco kaj varmeco kaj iam stepo pligrandiĝis pro sekeco kaj malvarmeco. Nun sciencistoj faras plian studon por pli ĝuste kaj komplete koni la tiaman naturan fizionomion.

En la Drakosta Monto kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj oni trovis sume pli ol 20 lokojn kun amasigitaĵoj entenantaj fosiliojn, simile al la kaverno de la Pekin-homoj, kiuj apartenis al geologia periodo antaŭ 10,000 ĝis 10,000,000 jaroj. Inter ili relative grava estas restadejo de la Suprakavernaj Homoj. Ĝi sin trovas supre de la kaverno de la Pekin-homoj kaj tre proksime al montsupro. Tie oni trovis fosiliojn de 7-8 homoj kaj aliajn objektojn. Inter homaj fosilioj estas tri kompletaj kranioj, kiujn oni elterigis el tombejo de la kaverno. Ĉirkaŭ la fosilioj dismetiĝis hematita pulvoro, kio eble

estis tiama moro, per kiu vivantoj esprimas sian deziron, ke la mortintoj akiru novan vivon. En la kaverno oni trovis ankaŭ poluritan ostan kudrilon kun trueto ĉe unu fino, kiu pruvis, ke la Suprakavernaj Homoj jam povis fari felojn en vestojn. Ili amis belecon kaj sciis ornami sin per "kolĉeno" farita el konkoj, bestaj dentoj kaj ŝtonaj globetoj. Laŭ ilia korpo ili jam eniris en la periodon de la saĝaj homoj, kaj laŭ iliaj ostoj ilia aspekto jam ne diferencis de tiu de la moderna homo. Ili estas praflavuloj, kiuj vivis en la lasta periodo de supra plejstoceno antaŭ 18,000 jaroj.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio la ĉina registaro tre zorgas la restadejon de la Pekin-homoj, konfidis ĝin al la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj prenis ĝin kiel unu el la gravaj kulturaj lokoj atente protektataj de la ŝtato. En 1953 tie fondiĝis ekspozicia ĉambro kaj en la Granda Proleta Kultura Revolucio stariĝis tie ekspoziciejo, kiu kune kun la restadejo de la Pekin-homoj malfermiĝis al rigardantoj en- kaj eksterlandaj. En ĝi estas ekspozitaj ĉefe fosilioj de la Pekin-homoj kaj la Suprakavernaj Homoj, aliaj objektoj kaj fosilioj de tiamaĵ animaloj, kaj ankaŭ gravaj fosilioj de prahomoj de diversaj periodoj elterigitaj en Ĉinio kaj fremdlandaj fosilioj de homoj. Ĉiujare dek-miloj da ĉinoj kaj miloj da fremdlandaj amikoj ĝin vizitas. Ĝoukoŭdian, "hejmo" de la Pekin-homoj, servas ne nur kiel bona klasĉambro por lerni historion, sed ankaŭ loko por plifortigi interkomprenon kaj amikecon inter la popoloj de Ĉinio kaj aliaj landoj de la mondo.

**La aŭtoro estas scienca laboranto de la Instituto de Pravertebruloj kaj Paleoantropologio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj.*



Unu dazibaŭo


EN la "Ekspozicio por Memori Kamaradon Ĝoŭ Enlaj" okazigita en la Ĉina Historia Muzeo, oni kun respekto kaj emocio legas unu dazibaŭon, sur kiu estas noto man-skribita de Ĉefministro Ĝoŭ. La dazibaŭo legiĝas jene:

Kamarado Ĝoŭ Enlaj,

Ni petas vin ŝanĝi vian nunan labormanieron kaj vivkutimon por ke ili konformu al via sanstato. Nur tiel vi povos pli longe kaj pli multe labori por la Partio. Elirante el la plej alta kaj malproksima intereso de la Partio kaj revolucio, ni petegas vin akcepti nian peton.

La dazibaŭo estis skribita de la kamaradoj laborantaj ĉe Ĉefministro Ĝoŭ en la 3-a de februaro de 1967. Kial ili skribis tiun dazibaŭon? Jen estis la afero:

En 1967 arde flamis la fajrego de la Granda Proleta Kultura Revolucio iniciatita kaj gvidita de la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ Zedong kaj plipeziĝis la ŝarĝo de la multe okupata Ĉefministro Ĝoŭ. Li senlace traktis tagnokte grandajn aferojn de la Partio kaj registaro. . . Ĝuste tiam Ĉefministro Ĝoŭ suferis kormal-sanon. Sed li tute ne zorgis tion. Li daŭre laboradis ĝis profunda nokto, kaj ĉiutage li dormis nur 2-3 horojn. Iam li eĉ ne havis tempon por preni manĝon. La laborantoj devis meti maizan kaĉon miksititan per legomoj kaj muelita viando en glason por ke Ĉefministro Ĝoŭ povu preni ĝin dum laborado. Foje oni faris al li kelkajn raviolojn, ta-



men li ne havis tempon por manĝi. Servisto plurfoje ilin varmigis kaj pro tio la ravioloj dispeciĝis. Fine Ĉefministro Ĝoŭ prenis la manĝon en aŭto dum veturado al iu loko. Tiamaniere nia estimata kaj amata

Ĉefministro Ĝoŭ pli kaj pli malgrasiĝis. La laborantoj ĉe li admonis lin zorgi la sanon, tamen li ĉiam diris, ke la granda gvidanto Prezidanto Maŭ pensas pri la grandaj (Daŭrigo sur p. 51)



Letero al japana amiko

de DU HJUAN

EN la lasta nokto de 1977, la Radio Pekino disaŭdigis la ĉefartikolon por la Novjara Tago "La Luma Ĉinio". Aŭdinte ĝin, mi tre emociiĝas kaj aspiras al la bela estonteco de nia patrolando.

Kvankam la nokto de suda Ĉinio estas ankoraŭ malvarma, tamen mi jam ebriiĝis de la ĉarmega muziko "Luna Nokto super Floranta Rivero". Post la frakaso de la "kvarpersona bando", nia popolo estas en granda ĝojo kaj plena vigleco, kaj nia granda socialisma patrolando paŝas al la brila estonteco!

Nia nacio havas jenan tradicion: En la jarfina nokto, la tuta familio kolektiĝas por atendi la alvenon de la Novjara Tago kaj poste oni benas la parencojn. Nun, mi sidas ĉe la skribotablo por atendi la alvenon de 1978.

Sur mia tablo, en brila lamplumo, sterniĝas longa letero skribita de vi—Tono Eiĝiro, malnova amiko de mia juneco. La letero plena de entuziasmo kaj profunda amikeco estis transdonita al mi de Sinjorino Sugimura Haruko en la lasta oktobro. En la du monatoj mi multfoje ĝin legis kun larmo kaj multfoje volis fari respondon, sed mi ne sciis de kie skribi pro mia implika penso. Nun, ĉe varma forno en la festa nokto kaj sub brila lumo mi ankoraŭfoje legas vian leteron.

Nature, la okazintaĵoj, kiuj jam pasis preskaŭ duonan jarcenton, denove unu post alia refreŝiĝis mian memoron. Estis vintro de 1934. Ni kelkaj ĉ. 20-jaraj lernantoj ofte babilis sidante ĉirkaŭ fajro en ligna kabano en ĉirkaŭurbo de Tokio. Ni ĉiuj estis studentaj dramon, sed al ni mankis praktika ŝanco en Japanio. En somero, kiam mi loĝis en marborda vilaĝo de Ĉigasaki, Tokeda Tajĝun portis al mi trimonatan gazeton "Literaturo", sur kiu estis publikigita la unua dramo de ĉina verkisto Caŭ Ju "Fulmotondro". Tiam la ĉina dramo troviĝis en komenca periodo. Plurscenaj dramoj kiel tiu de Caŭ Ju estis maloftaj. Traleginte ĝin, ni ĉiuj sentis grandan ĝojon kaj interkonsiliĝis por ĝin prezenti en Tokio. Tio ja estis malfacila por ni malriĉaj lernantoj en fremda lando, sen sperto kaj mono. Nia kuraĝa penso kaj poste sukcesa prezentado devenis ĉefe de tio, ke ni ricevis la subtenon de Sinjoro Akita Ujaku, la pioniro de japanaj maldestrakaj dramistoj. Tiam, li ĵus revenis de Sovetunio kaj sin okupis pri verkado de la "Kroniko de 50 Jaroj". Li loĝis en simpla kabano de la distrikto Zoŝigaja kaj vivis tre modeste. Kiam mi konsultis lin pri la afero, li donis al ni varman kaj senrezervan subtenon. Li proponis ke mi kontaktiĝu kun artistoj de la teatroto Cukiĝi. Tiel mi

konatiĝis kun vi. Sub via helpo, ni sukcese prezentis la dramon "Fulmotondro". Poste ni ofte partoprenis en la aktivadoj de progresiva teatro kaj prezentis niajn aliajn teatraĵojn.

Tio ja estas ordinara afero en la homa vivo. Ni apartenis al du malsamaj landoj sed havis komunan kredon, tio do fariĝis eksterordinara. Tiam, plenmano da japanaj militaristoj efektiviĝis faŝisman regadon super la japana popolo kaj planis barbaran agreson al Ĉinio. La milito estis tuj alvenonta. La granda japana popolo estis, kiel la ĉina popolo, oponanto de tiu ĉi milito. Vi tiam diris, ke vi estus rekrutita kaj irus al la batalejo de Ĉinio, se eksplodus milito. Kaj tiam ni povus intervidiĝi en la batalejo kaj kune kontraŭstarus al nia komuna malamiko—la japanaj militaristoj. En la Kontraŭjapana Rezistmilito de 8 jaroj, kvankam mi ne renkontis vin, tamen mi renkontis multajn japanajn amikojn similajn al vi. Ili batalis kune kun ni en sama tranĉeo. Sur ilia flago troviĝis jenaj vortoj: La Kontraŭmilita Unio de la Japana Popolo. Kiom mi sopiris vin tiutempe! Ĉar mi informiĝis de kamaradoj de la unio, ke la agresiva milito komencita de la japanaj militaristoj-faŝistoj ne nur enteriĝis alilande milionon da japanaj junu-

loj kaj portis senliman suferon kaj solecon al la japanaj patrinoj, sed ankaŭ alportis maltrankvilan kaj mizeran vivon al la japana popolo. Kvankam ni troviĝis en malsamaj cirkonstancoj, tamen havis saman sorton.

Ankaŭ en la tagoj, kiam la damninda "kvarpersona bando" senbride tiranis kaj mi estis izolita de la mondo, mi ofte vin sopiris. Mi pensis, ke vi certe miris pro la teruraj faroj de la "kvarpersona bando" kaj maltrankviliĝis pri nia sekureco.

Kiam mi legis vian leteron, mia supozo estis tute konstatita. Via letero diris: ". . . De la amikoj revenintaj de Ŝanhajo mi informiĝis ke vi ankoraŭ vivas sane, tio multe ĝojigis min. En tiuj tagoj la japana gazetaro parolis pri la stato de Ĉinio. Mi ĉiam maltrankviliĝis pro via tuta familio. Nun, mi estas tute trankvila. . .

"La foto de ni estas ĉiam en mia mansako. Mi ĉiam kunportas ĝin ĉe mi, kie ajn mi vojaĝas . . .

"Ĉu vi ankoraŭ memoras la poemon skribitan de vi al mi en la 6-a de junio de 1965? Nun, mi ĝin kopias al vi:

*De 1' adiaŭo en Tokio pasis
tridek jaroj;*

*Nun reintervidiĝas ni kun
prujn' jam en la haroj.*

*Rigardu ĝoje tra la mondo nubojn
en ventpelo;*

*Senfina bel' printempa regas
sur la tuta tero.*

Tiu ĉi poemo nun ankoraŭ pendas en mia legoĉambro.

"La japanaj ĵurnaloj multe raportis pri frakaso de la 'kvarpersona bando'. Pro via sekura reveno mi ne povas ne krei 'vivu!'. . ."



Tono Eiĝiro (maldekstre) kaj la aŭtoro

Ĉiu modesta frazo en la letero plenas je profunda amikeco kaj ĉiu bagatelo menciita montris sopiron al la malnova amiko.

Antaŭ ol mi ricevis vian leteron, mi sinsekve intervidiĝis en Ŝanhajo kun Nakaĝima Kenzo, Ŝirato Norio, Inoue Kijoŝi, Kinoŝita Ĝunĝi, Sajonĝi Kinkazu kaj aliaj multaj malnovaj amikoj. Plejparto de ili plurfoje batalis kune kun ni en internaciaj kunvenoj. En la lastaj dek jaroj, la malhelpo de la "kvarpersona bando" rompis komunikadon inter ni. Ni ĉiuj tre ĝojis pro la refoja intervidiĝo.

Estis serena tago de oktobro. Sur Hongkiaŭ-aerodromo ni bonvenigis en vespera krepusko la Japanan Dramistan Delegacion gvidatan de Sugimura Haruko. Mi tre ĝoje vidis, ke tiu 71-jara artistino descendis de la aviadilo per firmaj paŝoj. Rimarkinte nin, ŝi alkuris, tenis mian manon kaj kun larmoj en la okuloj diris: "Kiel ĝoja mi estas! Ĉifoje mi venis al Ŝanhajo speciale por viziti miajn malnovajn amikojn!" Tuj poste, ŝi elprenis vian leteron el sia mansako kaj diris: "Jen letero de Sinjoro Tono al

vi. Kiom li vin sopiras! Ankaŭ li planis partopreni en nia delegacio, tamen li ne efektivigis sian esperon pro sia teatra aktivado en Japanio. Tial, li komisiis al mi porti la leteron al vi, kaj bondezirojn al via tuta familio!"

Tiuj emociaj scenoj plenaj de amikeco aperis unu post alia antaŭ miaj okuloj. La belaj rememoroj, kvazaŭ bonodora vino, min ĉiam ebriigas.

Ĝuste en tiu momento la horloĝo anoncis la komenciĝon de 1978.

Kara amiko, la amikeca ponto detruita de la "kvarpersona bando" nun estas rekonstruita. En la lasta tempo, kun tre emocia koro mi tra legis la novan verkon "Sopiro al la Hejmlando" de nia malnova amiko Joda Ĵoŝikata. Ĝi estas, post lia "Tegoloj de Tenpejo-periodo", lia alia eminenta verko, temanta pri la kultura interŝanĝo inter Ĉinio kaj Japanio. Pri lia klopodo en tiu flanko mi esprimas al li mian elkoran respekton. Vintro jam forpasis kaj printempo tuj venos. Certe floros la floro de kultura interŝanĝo inter Ĉinio kaj Japanio!

Rostita pekina anaso

LA rostita pekina anaso kun aparta gusto estas unu el la famaj pladoj en Pekino. Ĝi havas delikatan viandon kun haŭto fragila kaj ruĝkolora, plaĉe bonodoras kaj estas grasa sed ne senapetiga. La frandaĵo estas preparita el anaso speciale bredita, kiun oni nomas pekina anaso. Nur tri monatoj estas bezonataj por kreskigi ĝin de la eloviĝo ĝis buĉado. En la unuaj du monatoj oni lasas ĝin mem preni nutraĵon kaj akvon en fiksitaj kvanto kaj tempo. En la lasta monato la anaso estas grasigita perforte t. e. englutigi al ĝi difinitan kvanton da nutraĵo. Post tri-monata bredado ĉiu el la anasoj pezas 3-4 kilogramojn.

Antaŭ rostado oni devas unue senplumigi kaj lavpurigi la buĉitan anason, kaj aeri ĝin tra ĝia gorĝo por ŝveligi la korpon por rostado. Poste, oni devas fari sub ĝia dekstra flugilo arkoforman aperturon kun longeco de 1.5 coloj, tra kiu elpreni la internaĵon, subteni la ventron per peco de sorgotigo, enverŝi akvon tra la aperturo por lavi la internon kaj ĝin pendigi.

Oni devas verŝi sur la pendigitan anason bolantan akvon por ke ĝiaj poroj kuntiriĝu, la proteino en la epidermo koaguliĝu, la subepiderma aero maksimume ŝveligi kaj la haŭto oleo brilu. Tuj poste, oni devas ŝmiri ĝin per sukerakvo (1 unco da hordea sukero kaj 9 uncoj da akvo) por ke la rostita anaso fariĝu karmezina kaj fragileca, kaj pendigi ĝin en aerumebla loko sen sunbrilo.

Rostitaj anasoj



Post tiuj procedoj oni devas ŝtopi ĝian anuson per peco de sorgotigo. Tra la trueto sub la flugilo oni plenigu la ventron je 80% per bolanta akvo kaj metas ĝin en bakan fornon. En la interna kaj ekstera varmego, la anaso estas preparita en mallonga tempo kaj ĝia viando fariĝas tre freŝa kaj bongusta. La fornoj por rostado estas speciale faritaj kaj inter ili troviĝas tri specoj. Plej ofte uzata estas tia forno, en kiu oni pendas anasojn kaj rostadas ilin per reflektita varmego de la forno. Ĝia interna temperaturo estas 230-250° C. Nur 35-45 minutoj estas bezonataj por rosti anason pezan je 2 kilogramoj.

En la preparado oni devas atente zorgi pri la brusto facile karbigebla kaj ne metu ĝin rekte al fajro; dume oni devas rosti la du gambojn kun dika viando pli longe; kaj la intergambaj lokoj estas malfacile

rostitaj, dum rostado oni devas rosti tiujn lokojn mane. Kiam la pezo de rostata anaso reduktiĝas je triono kompare kun tiu antaŭ la rostado aŭ ĝi fariĝis karmezina kaj oleo brila, la rostata anaso jam estas taŭga por manĝado.

Tiam oni devas elpreni ĝin el la forno, elpreni la pecon de sorgotigo el la anaso kaj ellasi la akvon el la ventro. Oni ofte tranĉas ĝian viandon kun haŭto en maldikajn pecojn. Iam oni tranĉas la viandon aparte de la haŭto.

Estas multmaniere por frandi rostitan anason. Ordinare oni envolvas ĝiajn viandpecojn kun spicaĵoj en farunan maldikan patkukon. Ĝian skeleton oni povas prepari en tre bongustan supon kun brasiko aŭ vaskukurbo. El la rostita anaso oni ankaŭ povas prepari malvarmajn pladojn aŭ varmajn pladojn.

Petofi, hungara patriota poeto



S. Petofi

LA 1-a de januaro, 1978 estis la 155-a datreveno de la nasikiĝo de la fama hungara patriota poeto Sandor Petofi.

BRAVA BATALANTO KONTRAŬ AGRESO

La Hungara Nacia Muzeo majeste staras sur bordo de Danubo en Budapeŝto. Sur la altaro dekstre de ĝia pordo, Petofi laŭtleĝis, en la 15-a de marto de 1848, sian poemon "La Nacia Kanto" al pli ol dek mil ribelantoj kolektiĝintaj sur la placo:

*Ek, hungaro! La patrian
vokon aŭdu! Nun, se iam!
Aŭ plu sklavi aŭ liberi:
jen demand'! Ĉu konsideri?*

Tiutempe torente pluvegis kaj laŭte kriegis la leviĝintoj sur la placo:

*diras ni,
ĵuras ni, ke ĵugon plu ne
tiras ni!*


Tiutage, Petofi foje-refoje laŭtleĝis tiun poemon al la amasoj kaj per ĝi forte stimulis kaj mobilizis la hungaran popolon al batalo por libero. Stimulate de Petofi, la insurekciuloj ĉirkaŭis la urbodomon de Peŝto, torentis al Buda, malfermis la pordon de malliberejo, liberigis la politikajn malliberulojn, metis la tutan ĉefurbon

sub sian regadon kaj per tio levis la kurtenon de la hungara revolucio en 1848.

Tiutempe, Hungario estis sub la regado de la Habusburga Dinastio de Aŭstrio, kaj ĝia popolo sopiris sendependiĝon de la patrolando kaj liberiĝon de la nacio. En printempo de 1848, sub la influo de la revolucia tajdo de Parizo kaj Vieno, vigliĝis la atmosfero de Hungario.

Sub la gvido de la nacia heroo Louis Kossuth kaj aliaj, la hungara popolo komencis intensan batalon kontraŭ la koloniista regado de Aŭstrio. En oktobro de 1848, Petofi mem partoprenis en la liberiga milito. Li batalis kontraŭ la malamiko samtempe per plumo kaj glavo. En tiu periodo li verkis multajn batalajn kantojn kaj marŝojn por kuraĝigi la batalantojn.

En la 14-a de aprilo, 1849, Hungario oficiale deklaris en batalo sian sendependiĝon. Tiam la internaciaj reakciuloj estis teruritaj. Je la fino de majo, la rusa caro Nikolao la Unua ekspedis 140,000 soldatojn por helpi la aŭstrajn reakciulojn kaj rapide malboniĝis la situacio. Fronte al la atako de la superecaj aliancaj trupoj de Aŭstrio kaj Rusio, la hungaraj patriotoj faris rezoluntan rezistadon. La 31-an de julio, Petofi heroe martiriĝis en batalo kontraŭ carrusia trupo, en sia aĝo de nur 26 jaroj.



Verkoj de S. Petofi

Kvankam la batalantoj por sendependeco estis sange subpremitaj, tamen tiu batalo “kun heroa karakterizaĵo”, kiel Engels priskribis, estis granda kuraĝigo por la postaj naciliberigaj bataloj de la hungara popolo.

POETO AMATA DE LA POPOLO

Hodiaŭ en la urbeto Kiskoros en suda Hungario oni ankoraŭ zorge konservas simplan kamparanan kabanon kun fragmita tegmento. Tio estas la antaŭa loĝejo de Petofi. Supre de iu ruĝtegola domo proksime de ĝi troviĝas blankaj vortoj grandliteraj “Petofi vivas!”, kiuj estas videblaj de malproksime. En 1823, Petofi naskiĝis en buĉista familio. En sia knabeco li lernis diligente kaj ŝatis verki. En la 16-jara aĝo li komencis sian vivon malstabilan: soldatiĝi, vagadi kaj aktori en migra teatra trupo. Li migris tra la tuta lando kaj propraokule vidis la suferojn de la popolo.

Ekde 1842, Petofi verkadis abunde. Li prenis pejzaĝojn de vasta hungara stepo, honestajn kaj malriĉajn laborulojn kaj heroojn en popolaj legendoj kiel temojn. Ekde la jaro 1846, la enhavo de la verkoj de Petofi pli strikte ligiĝis kun politiko. Li klare montris sian opinion:

*Poetoj, do tra fajro-akvo
ek por popol', ek por la ver'!
Se vi kapblas sole kanti
pri l' propraj ĝojo kaj dolor',
ja vin la mondo ne bezonas,
la sanktan lignon metu for!*

En 1844, post eldono de la unua poemaro de Petofi, aristokrataj literaturistoj atakis lin dirante, ke li “portis vulgarajn popolajn lingvaĵojn en la sanktan palacon poezian” kaj “kantas por la plebanoj”. Sed ju pli multe la nobelaj sinjoroj lin malbenis, des pli multe la popolo lin ŝatis kaj estimis. Kaj Petofi fariĝis fame konata poeto tra la tuta lando.

En la pasintaj pli ol cent jaroj, la poemoj de Petofi vaste cirkulis tra Hungario kaj multaj el ili estis tradukitaj en Esperanton kaj aliajn dekojn da fremdaj lingvoj kaj legataj de eksterlandanoj.

VARME LAŬDITA KAJ REKOMENDITA DE LUSIN

Estis Sinjoro Lusin, kiu la unua konigis la vivon kaj verkojn de Petofi al Ĉinio. En 1933, Lusin menciis poemon de Petofi ĉinigitan de Baj Mang en sia artikolo “Memorigo por Forgeso”:

*La Amo, la Liber',
Plej karaj sur la ter'!
Por la Amo mi oferas
Vivoflamon,
Por Libero mi oferas
Mian amon.*

Tiu poemo siatempe cirkulis inter multaj ĉinaj legantoj kaj ilin emociis kaj kuraĝigis. En la dirita artikolo, Lusin plurfoje menciis Petofi kun admiro. En sia juneco Lusin jam tre amis poemojn de Petofi. Li speciale aĉetis per helpo de librejo germanan tradukaĵon de prozoj kaj poemoj de Petofi el Germanio kaj intencis ilin ĉinigi. Konatiĝinte kun Baj Mang, li donacis siajn longe konservitajn librojn de Petofi al li kaj publikigis biografion kaj poemojn de Petofi tradukitajn de Baj Mang en la gazeto *Torento* redaktata de Lusin. Lusin skribis en la “Vortoj post Redaktado”: “Ricevinte la unuan artikolon ‘Pri la Vivo de Petofi’, mi ekmemoris pri mia juneco, ĉar tiam li estis mia estimata poeto. Ja estis tute nature, ke homo sub la manĉua registaro simpatiis kun heroo kontraŭstaranta la rusan caron.”

Efektive je la komenco de tiu ĉi jarcento Lusin jam komencis konigi Petofi kaj liajn verkojn al

ĉinaj legantoj. En 1907, Lusin detale konigis liajn vivon kaj pensojn al Ĉinio kaj en la sekvanta jaro li tradukis la ĉapitron pri Petofi en "Historio de la Hungara Literaturo". En 1925, li tradukis 5 poemetojn de tiu poeto. Kaj en januaro de la sama jaro, li prezentis sian tradukaĵon de lia poemo "Pri Espero" kaj ĝin metis en artikolon de la libro "Sovaĝaj Herboj", kaj skribis en la sekvantaj linioj: "La granda lirikisto kaj patrioto de Hungario jam mortis pro la patrolando sub la kozaka lanco antaŭ sepdek kvin jaroj. Granda domaĝo estis lia morto, sed la pli granda domaĝo estas tio, ke liaj poemoj restas ĝis nun senmortaj." En novembro de 1929, kiam Lusin

ricevis la ĉinan manuskripton de la epopeo de Petofi "Johano la Brava" tradukitan el Esperanto, li atente ĝin kontrolis. En tiu tempo, Lusin vivis en malfaciloj kaj klopodadis dum unu kaj duona jaro por eldoni ĝin.

Je unu jaro antaŭ sia morto, Lusin foje kaj refoje citis, en siaj artikoloj, poemojn de Petofi parolante pri la rilato inter vivo kaj arto kaj pri amo kaj malamo.

La vivo de Petofi estis mallonga, sed liaj poemoj kaj batalspirito por la sendependeco kaj libero de la nacio multe transpasis la limojn de liaj vivtempo kaj patrolando.



Iom pri la ĉinaj naciaj muzikiloj

Respondo al S-ro H.C. Lujke

1978, Pekino
Sinjoro H. C. Lujke,

Antaŭ nelonge la redakcio de EPC transsendis al mi vian leteron, en kiu vi skribis: ". . .vi faros grandan plezuron al mi se mi povos legi en via gazeto artikolon pri tradiciaj ĉinaj muzikiloj kun iliaj nomoj kaj la rolo de ili en la orkestro", por ke mi iom parolu pri la temo elmetita de vi.

Kiel esploranto en la Ĉina Muzika Studĉambro, mi volonte skribas al vi, kvankam ne tiel multe mi scias pri la ĉinaj naciaj muzikiloj.

Tre longa estas la historio de la ĉinaj naciaj muzikiloj. Multaj el la naciaj muzikiloj estas kreitaj de la laboranta popolo en la praktikado de vivo, kun la disvolviĝo kaj laŭ bezono de la ĉinaj kulturo kaj arto. Malmultaj el ili devenis de aliaj landoj kaj post reformo fariĝis niaj naciaj muzikiloj. Ĉinio konsistas el multaj naciecoj, tial multspecaj estas niaj naciaj muzikiloj kun rimarkindaj karakterizaĵoj, kiuj es-

tas uzataj ne nur por akompanado, sed ankaŭ por solo kaj kunludo.

La nombro de la hodiaŭ vaste uzataj naciaj muzikiloj estas pli ol 200. Ili povas esti klasifikitaj en 4 grupoj, nome blovaj, arĉaj, plukaj kaj perkutaj instrumentoj.


La blovaj instrumentoj estas plejparte faritaj el bambuaj aŭ lignaj tuboj. Ili sonas laŭte kaj taŭgas por ludi fluajn melodiojn. Al tiu grupo apartenas *diz-o* (bambua fluto sen klapoj), *gŭanz-o* (simpla klarneto kun duobla anĉo sen kla-

poj), *ŝeng-o* (harmoniko el bambuaj tuboj), *ŝjajŭ-o* (vertikala bambua fluto kun blovtruo ĉe la supra fino, sen klapoj) kaj surnao (simpla hobojo sen klapoj), inter kiuj *diz-o* estas la plej vaste uzata.


En la fino de la Periodo de Militantaj Regnoj (475 — 221 a. K.), *diz-oj* jam komencis disvastiĝi en nia lando. Laŭ historia noto, la tiama *diz-o* similas al la nunaj. Ĝi estas bambua tubo longa je 30-40 centimetroj kun unu blovtruo, unu truo por fragmita membrano kaj 6

La nacimuzika trupo de la Ĉina Kantodanca Ensemblo en provludo






Bivo



Erhu-o



Diz-oj



Tamburo

truoj fermeblaj de fingroj por produkti diversajn tonojn. Per forta aŭ malforta blovo oni povas produkti per *diz*-o pli ol du gamojn de klaraj belaj tonoj. *Diz*-oj estas uzataj ne nur por solo kaj akompano, sed ankaŭ en kunludado kun aliaj muzikiloj, kaj ofte por ludi la ĉefajn melodiojn.

Arĉaj muzikiloj produktas sonojn kun relative mola kaj bela tembro kaj taŭgas por ludi kantomelodiojn. Inter ili la nun ofte uzataj estas *erhu*-o (dukorda arĉinstrumento), *gaŭhu*-o (speco de *erhu*-o, kiu povas produkti altajn tonojn), *ĝinghu*-o

(malgranda *erhu*-o de akutaj tonoj por akompani pekinoperajn kantojn), *banhu*-o (*erhu*-o kun malprofunda tubforma sonkesto fermita ĉe unu ekstremo per ligna disko) kaj *matoŭĉin*-o (matoŭ signifas ĉevalkapon kaj *ĉin* signifas muzikilon, specon de granda *erhu*-o kun kvadrata sonkesto kaj ligna ĉevalkapo ĉe la supra fino de la kordstango). Inter ili la plej vaste uzata estas *erhu*-o.

Erhu-o nomiĝis *hiĉin*-o antaŭe en Tang-dinastio (618 — 907 p. K.) kaj en Song-dinastio (968 — 1127 p. K.) aperis la nomo *huĉin*-o. Ĉar ĝi havas du kordojn, oni alinomis ĝin poste *erhu*-o (*er* signifas du).

La sonkesto de *erhu*-o estas tubo el malmola ligno, fermita ĉe unu ekstremo per boao-haŭto. Al la sonkesto instaliĝas stango kun du


kordoj, inter kiuj moviĝas la arĉo por produkti sonojn per frotado.

La plukaj instrumentoj taŭgas por ludi viglajn melodiojn kun klaraj taktoj. La relative ofte uzataj de tiu speco estas bivo, *liuĉin*-o, *sanŝjan*-o (*san*=tri, *ŝjan*=kordo(j), do trikorda muzikilo) kaj dombro, kiuj estas ludataj tenate en la sino, kaj zimbazono, *ĝeng*-o (simila al zimbazono, pluke ludata) kaj *ĝjajeĉin*-o, kiuj estas ludataj surtable. Inter ili bivo kaj zimbazono estas la plej vaste uzataj.


Bivo estas grava pluka instrumento de nia lando. Ĝi aperis en Kin-dinastio (221 — 207 a. K.), kaj en Tang-dinastio ĝi jam estis vaste uzata kaj disvolviĝis en muzikilon por solo.

Tiu muzikilo simila al liuto konsistas el du partoj, nome la kapo kaj


Gongo



Zimbazono



Cimbaloj



la korpo, ambaŭ faritaj el ligno. Ĝia supra parto estas maldika kaj mallarĝa, dum la malsupra, nomata ventro, estas pli larĝa. Sur la sonkesto troviĝas vico de transversaj latetoj super kiuj streĉiĝas kvar kordoj el silko, metalo aŭ nilono. Dum ludado, oni premas la kordojn per fingroj de la maldekstra mano kaj plukas ilin per tiuj de la dekstra mano. Ĉar la diferencoj inter la tembroj de ĝiaj kordoj estas grandaj, la gamo estas vasta kaj pli ol 20 ludmanieroj de la fingroj estas kreitaj, tiu instrumento havas relative riĉan esprimivon. Ĝi povas ludi same bone belajn lirikajn ariojn kaj ardaĵn imponajn muzikaĵojn.

Zimbalono ekaperis en Ming-dinastio (1368 — 1644 p. K.). Ĝi havas lignan papiliforman sonkeston. Ordinare ĝi havas ĉe siaj ambaŭ flankoj po 24 kordostreĉajn fostetojn kaj 48 kordojn streĉitajn sur ili. Batite per du bambuaj frapiloj, la kordoj povas produkti klarajn kaj daŭrajn tonojn. Ĝia gamo estas relative vasta kaj ĝi povas produkti kromatan gamon.

Inter niaj naciaj muzikiloj sin trovas multaj specoj de perkutaj instrumentoj kun malsamaj formoj kaj tembroj. Ili estas uzataj por marki taktojn.

La ĉefaj inter ili estas tamburoj, gongoj kaj cimbaloj. Ili povas ludi specialajn verkojn por perkutaj instrumentoj aŭ ludi kune kun blovaj kaj kordaj instrumentoj kaj akompani kantojn de operoj, dancojn kaj kantrakontojn.

En Ŝang-dinastio (16-a ĝis 11-a jarcento a. K.) jam aperis tamburo, en la dinastio Malantaŭ Vej (la 6-a jarcento p. K.) aperis gongo kaj en la Periodo de Tri Regnoj (220 — 280 p. K.) aperis cimbaloj. Kvan-kam ili naskiĝis en malsamaj tempoj, ili tamen estas ofte kune ludataj poste. Per siaj fortaj sonoj ili povas bone prezenti viglan vervan etoson. En diversaj festaj aktivadoj, oni ofte uzas tiujn muzikilojn dum manifestacioj kaj kunvenoj. Kaj per frapetado, oni povas esprimi ankaŭ humoron de vigla gajeco.

Tre diversaj estas la kunludoj de ĉinaj naciaj muzikiloj, kaj aparte

multespecaj estas la kunludoj de malmultaj instrumentoj. Kunludaj instrumentaj grupoj ĝenerale formiĝas el tradiciaj naciaj muzikiloj de certaj regionoj, kaj konforme al prezentado de tiaj grupoj formiĝis ankaŭ respektivaj instrumentaj muzikoj. Ekzemple, apartajn lokajn stilojn kaj kolorojn havas la popolaj muzikoj de Guangdong kaj Ĉaŭĝoŭ, la kordmuzikila kaj bambufluta muziko de suda Giansu kaj la gonga kaj tambura muziko de orienta Ĝegiang.

Post la fonda de la Popola Respubliko, ĉinaj muzikistoj faris reformojn al iuj naciaj muzikiloj; konservante la tembrojn kaj tradiciajn ludmanierojn, oni laŭtigis iliajn sonojn kaj pliampleksigis iliajn gamojn por havigi al ili bezonatan kapablon. Kaj samtempe, multaj novaj muzikaj verkoj spegulantaj la novan vivon kaj novajn pensojn de la popolo estas kreitaj por riĉigi la kulturan vivon de la diversnacieca popolo de Ĉinio. Salutojn!

Sincere via

Gian Kihua

(Daŭrigo de p. 43)

aferoj de la ŝtato kaj oni devas zorgi lian sanon, kaj ke li devas pli multe fari konkretajn aferojn por malpezigi la ŝarĝon de Prezidanto Maŭ.

Vidinte tion, ĉiuj tre maltrankviliĝis kaj plurfoje iris al Kamaradino Deng Jingĉaŭ, la edzino de Ĉefministro Ĝoŭ, kaj petis ŝin admoni Ĉefministron Ĝoŭ zorgi la sanon. Tamen Kamaradino Deng Jingĉaŭ ĉiam diris, ke oni devas pli multe zorgi Ĉefministron Ĝoŭ en politiko, sed ne ĉiam en la vivo. Pro tio, la kamaradoj laborantaj ĉe Ĉefministro Ĝoŭ skribis, post interkonsiliĝo, tiun dazibaŭnon. Post du

tagoj, laŭ la opinio de Kamaradino Deng Jingĉaŭ, ili aldonis kvinpunktan "aldonan proponon" en la dazibaŭno, sur kiu Kamaradino Deng Jingĉaŭ subskribis. Leginte ĝin Kamaradoj Je Gianjing, Li Hian-nian, Nie Ĵongĝen, nun jam forpasintaj Ĉen Ji, Li Fuĉun, kaj aliaj subskribis ĝin por esprimi sian subtenon.

En la dua tago post apero de la dazibaŭno, Ĉefministro Ĝoŭ serioze skribis sur ĝi "Mi sincere akceptis la opiniojn kaj ilin praktikos". Efektive, li ne povis plenumi ilin. En malsano li des pli laboradis sinforĝese, ne ripozis eĉ nokte kaj tag-

meze. Foje, Ĉefministro Ĝoŭ laboris tutan nokton en sia kabineto kune kun gvidanta kamarado, kaj frumatene li daŭre legis dokumentojn kaj faris instrukciajn notojn. Kiam tiu kamarado admonis lin al ripozo, li diris, ke li jam grandaĝis kaj devas multe pli labori por la Partio en la lastaj jaroj. Li petis Kamaradinon Deng Jingĉaŭ diri al iu kamarado, ke li ne tro zorgu lian sanon, sed zorgu gravajn aferojn de la Partio kaj ŝtato.

Hodiaŭ, kiam ni rigardas tiun valoran historian objekton, kiel ni povas ne sopiri pli forte nian Ĉefministron Ĝoŭ!

Eŭropa Dokumentaro. Kontraŭe al kelkaj sciigoj en la gazetaro, ĝi ne ĉesas aperi. Kaj ĝi aperos ekde ĉi-jaro eĉ pli amplekse kaj pli belaspekte je la samaj kostoj (abono 220 BF aŭ egalvaloro por la 4 numeroj).

Dum la jarĉefkunveno de la Societo pri lingvolim-transpaŝa eŭropa interkompreniĝo (Eŭropa Klubo), ties delegitaro unuanime decidis akcepti la Eŭropan Dokumentaron ekde 1978 kiel la oficialan organon de tiu societo disvastigita en la landoj de la Komuna Merkato kaj en diversaj aliaj eŭropaj landoj. Krom la ĝisnunajn eŭropapolitikajn kaj aliajn pli ĝeneralajn dokumentojn, kies amplekso restos, la revuo enhavos ankaŭ novaĵojn pri la agadoj de la Eŭropa Klubo en speciala rubriko.

Ekestas nova redakcio kiun gvidos Guido Dignas, Linnebornweg 5, D-4790 Paderborno, Tel. (05251) 56462.

Oni pagu la abonkostojn kiel ĝis nun al la peranto aŭ rekte al la

Eŭropa Klubo, konto 8604747401 ĉe Volksbank, Paderborn (resp. por tio konto al poŝtĉekkonto Hannover 3521/307)

UEA alvokas pri organizado de konkursoj por tradukita beletro je nacikadra nivelo. Kiel sciante, en 1975, UEA decidis forigi ĉiujn tradukajn branĉojn el la Belartaj Konkursoj, pro praktika neeblo elekti juĝantojn kun la necesa kono de plurdekoj da lingvoj por kompetente juĝi pri la reala valoro de la alvenintaj tradukaĵoj (interalie el la malta lingvo, el iu antilia dialekto, el la helena, el la araba, el la vjetnama k. t. p.).

Por ne malkuraĝigi la esperantajn verkistojn plue aktivi en tiu tre valora ĝenro literatura, kiu ĉiam larĝe stimulis evoluadon kaj pliriĝigon de nia lingvo.

UEA nun alvokas, ke oni organizu tiaspecajn konkursojn je nacikadra nivelo kaj respektive **por unu difinita lingvo.**

Landaj asocioj estas petataj priekzameni la eblecojn aranĝi literaturajn konkursojn ĝuste kaj ekskluzive por tradukita beletro kaj por la respektiva nacia lingvo.

Laŭ tiu linio Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko kaj la Londona Klubo interkonsente jam efektivigis tian iniciaton por la angla lingvo kaj ankaŭ konkurso "Larius" (Italio) enkondukis tradukan branĉon. Ambaŭ ricevis aŭspicion de UEA.

Unua Latin-Amerika Esperanto-Kongreso okazos de la 17-a ĝis la 22-a de julio, en la brazila urbo Marilia (S. P.).

La korespondadreso estas: Cooperativa Cultural dos Esperantistas, Av. Treze de Maio 47, sobreloja 208, BR-20 000 Rio De Janeiro, Brazilo.

Konferenco de Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj ĉi-jare okazos en la pola urbo Novy Saz de la 8-a ĝis la 15-a de Aŭgusto.

Korespondi deziras

* Moira Kinnaird, 20-j., Argenta B.C., Ven. Del., Vog-IBo, Kanado (Canada), kun plum-amiko el Ĉinio pri lingvoj, muziko.

* S-ro Paul Leduc, 35 Ave N.D. du Lac, 49000 Angers, Francio, kun ĉinaj geesp-istoj pri pm.

* Theodor Kretschmann, Drewestr. 18, D4784 Ruthen 4, F.R. Germanio, kun ĉinaj amikoj.

* Seriozajn kolektantojn de neuzitaj pm kaj unuatagaj kovertoj en Ĉinio kaj Japanio serĉas Stanislaw Biesiada, Poŝtkesto nr. 599, PL-42-217 Czestochowa 17, Pollando.

* Vasil Velĉev, str. KL. Ohridski 11, BG-5300, Gabrovo 3, Bulgario, 38-j.

instruisto de elektrotekniko en mezlernejo, kun ĉl. pri ĉt. kaj interesiĝas pri bk kaj pm.

* S-ro Curt ohman, 46-j. inĝeniero, Bjorkvag. 10, S-93060 Norsjo, Svedio, kun ĉinaj geesp-istoj.

* Coll Josefo, 254, Bd. de la Madeleine, 06000 Nice, Francio, kun ĉl. pri demandoj de paco kaj homara feliĉo.



Flora foiro de Kantono

Kantono — la ĉefurbo de Guangdong-provinco kaj la plej granda urbo en suda Ĉinio, estas heroa urbo kun glora revolucia tradicio. Ĝiaj multaj revoluciaj historiaj restaĵoj registris la historion de heroa batalado de la kantona popolo kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo dum

la lastaj cent jaroj. En la jaro 1926, Prezidanto Maŭ Zedong, la granda gvidanto de la ĉina popolo, tie funkciigis la Instituton de Kamparana Movado de Kantono kaj elkulturis grandan nombron da kadroj por direkti la ĉinan revolucion de venko al venko.

Kantono estas ankaŭ unu el la ĉinaj havenurboj plej frue komercantaj kun fremdaj landoj. Ekde la dinastioj Kin kaj Han ĝi funkcias, dum pli ol du mil jaroj, kiel ekonomia centro de suda Ĉinio kaj la plej grava komerca haveno de nia lando. Nun ĝi estas sidloko de la ĉina eksporta komerca foiro. Ĉiujare dum okazo de la foiro tie svarmis komercistoj de diversaj landoj, kaj tio pliiĝis la interkomprenon kaj amikan kunlaboron inter Ĉinio kaj aliaj landoj.

Post la Liberigo, la ekonomio de Kantono akiris rapidan disvolviĝon. La totala produktovaloro de ĝia peza industrio de 1975 estis 100-oble de tiu en 1949 kaj tiu de la malpeza industrio kreskis 18-oble. Relative rapide disvolviĝis ĝiaj industriaj branĉoj de fero, ŝtalo, maŝinoj, kemiaĵoj, mangajoj, tekstilaĵoj, papero, kaj ŝipkonstruado. Ĝi jam unuapaŝe metis por si fundamenton kiel industria bazloko de suda Ĉinio.

Situante sude de la norda tropiko, Kantono kun jara meznombra temperaturo de 21.8° C estas bela urbo kun tropika pejzaĝo. En la Printempa Festo, kiam norda Ĉinio ankoraŭ estas kovrata de neĝo, en Kantono tamen jam prosperas floroj. La flora foiro okazanta en ĉiu jaro estas kantona tradicia foiro. En la flora foiro troviĝas diversaj floroj kun buntaj koloroj en verdaj folioj. Nokte, iluminate de brilaj lampoj ili aspektas ankoraŭ pli bele kaj plaĉe.




★ Pekino

• Kantono



Parto de la flora foiro en la Kultura Parko

La flora foiro en nokto



Livero de floroj al la foiro



Nova atingo en studo pri vipura veneno

La sciencistoj de la Junnan-a Zoologia Instituto faris studon pri vipura veneno ekde la jaro 1974, sub la helpo de koncernaj unuoj, kaj jam akiris ĝojindan atingon. La vipura veneno estas kompleksa proteina miksaĵo konsistanta el pli ol dek elementoj kunmalsamaj naturoj inkluzive de nerva, kora kaj hematocita venenoj, kaj ankaŭ el pli ol dek specoj de enzimo. Sur la bazo de teoria studo ili sukcesis fari sedativon kontraŭ obstina doloro, oksidazon de amina acido uzata en reakciila fabriko, kaj enzimon por analizado — fosfodiesterenzimon bezonatan en artefarado de nuklea acido kaj aliajn produktaĵojn.



Aĉetado de freŝaj floroj




Reveninte de la flora foiro

Geknaboj amas florojn.




Diskutado pri
utiligo de vipura
veneno



Kolektado de vipura veneno



Apartigo de diversaj elementoj de vipura veneno




Produktajoj de vipura veneno faritaj de la Instituto

Verkoj el la Ekspozicio de Metiartaĵoj




Plektaĵoj



INSIGNOJ



Porcelanaĵo de Fugian «Caj Vengi»




Ebura skulptaĵo de Pe kino «Maturiĝis Liĉioj»





Buksligna skulptaĵo
de Ŝanhajo «Mi
Stiras Traktoron en
Nubo»

Agata skulptaĵo
de Pekino «Gra-
nato»



Duflanka brodaĵo de
Suĝou «Tri Katoj»

LA AKVOVERŜA FESTO

(POPOLRAKONTO DE
TAJ-NACIECO EN JUNNAN-PROVINCO)

Teksto de ĜENGPENG

Bildoj de GETIAN




1. Mengbalanahi estas bela riĉa loko, sed antaŭ tre longe ĝin okupis kruelega demono.




2. La demono povis ludi magian artifikon. Per ekblovo li povis estigi incendion, kaj per kraĉo inundon. Li portis grandan suferon al la popolo.




3. Iufoje, la demono forkaptis sep belajn knabinojn kaj edzinigis ilin al si kontraŭ ilia volo.



4. Kun indigno la knabinoj interkonsiliĝis por mortigi tiun malfeliĉiganton por la popolo. Unu el ili nomata Ju Naniang elpensis sagacan planon por tio.



5. En la sekvanta tago Ju Nanhiang ebruiĝis la demonon per vino kaj diris al li: "Via Moŝto povas komandi venton kaj pluvon, estas nevundebla per glavo kaj sago, do neniuj en la mondo povas vin venki. . ."



6. Aŭdinte tion, la demono diris ĝoje: "Mia kara, se iu ŝirus unu el miaj haroj kaj min strangolus per ĝi, tiam mi mortus."



7. Nokte, kiam la demono dolĉe dormis ronkante, Ju Nanhiang ŝiris unu el liaj haroj kaj ĉirkaŭligis per ĝi lian kolon, tiam lia kapo tuj falis kaj ruliĝis for.



8. Kien ajn lia kapo ruliĝis, tien tuj etendiĝis incendio. Por forigi la plagon, la sep knabinoj alterne tenis la kapon kaj senĉese verŝis akvon el la Ora Lago sur la flamojn kaj fine estingis la incendion.



9. Por memori la sep knabinojn, la taj-a popolo okazigas ĉiujare en la mezo de aprilo, akvoverŝan aktivadon, por neniigi pestojn kaj katastrofojn, venigi novan abundan jaron kaj havigi bonan sanon al la popolo. Jen estas la deveno de la Akvoverŝa Festo de la taj-oj.



8152

